

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

3

1996

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO

Amor





Ĉe la sunsubiro

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

La Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) fondita en 1951 fariĝis 45-jara. Kian vojon ĈEL iris en la pasintaj 45 jaroj? Kion ĝi kontribuis al la E-movado de Ĉinio? Se vi interesiĝus pri tio, bonvolu legi la artikolon "ĈEL — 45-jara" verkitan de s-ro Zhang Qicheng, honora prezidanto de ĈEL.

Ekzistas diferencoj inter enspezoj de homoj. Kiel helpi tiujn, kiuj malmulte enspezas, por ke ili pli bone vivu? En la lastaj jaroj, laŭ sia ekonomia disvolviĝo, Ŝanhajo, Pekino, Ŝenjang kaj iuj aliaj urboj de Ĉinio praktikis la sistemon de "minimuma vivgarantia linio". Nun la sistemo disvastiĝas en multaj urboj. Bonvolu legi artikolon "Ĉu la vivo de malriĉaj urbanoj garantiata?" sub la rubriko "Temo

Proponita de Legantoj".

En la ekonomia socia vivo ofte renkontiĝas "tineoj" kaj "sango-suĉantoj". Por garantii glantan iradon de la ekonomia konstruado kaj protekti interesojn de la popolo, Ĉinio prenas batalon kontraŭ koruptiĝo kiel sian longperiodan taskon. La artikolo "Grandaj atingoj en batalo kontraŭ koruptiĝo" temas pri la batalo.

Por kontentigi la legantojn, kiujn interesas la ĉina lingvo, ni publikigis la artikolon "Ĉu la ĉina lingvo malfacila?" en la 7-a kaj 8-a numeroj de EPĈ 1995. En ĉi tiu numero ni prezentas al vi la interesan verkon "Idiomoj en la ĉina lingvo". Preskaŭ en ĉiu lingvo ekzistas idiomoj, do kiaj estas idiomoj en la ĉina lingvo? La aŭtoro detale eksplikas ilin.

La Red.


98 / 522 / 0

ENHAVO

- | | |
|--|---|
| <p>2 <i>INTER NI</i></p> <p>4 <i>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:</i>
Ĉu la vivo de malriĉaj urbanoj garantiata?</p> <p>6 ĈEL — 45-jara</p> <p>8 <i>ĈINAJ E-ISTOJ:</i>
Zeng Hojaŭ, prezidanto de la Pekina E-Asocio</p> <p>11 <i>ESP-NOVAĴOJ</i></p> <p>12 <i>VOĈO DE E-ISTOJ:</i>
Respondi — respondi
Numeraloj — pripensinda simpligo</p> <p>13 <i>KORESPONDI DEZIRAS</i></p> <p>14 <i>POR KOMENCANTOJ:</i>
Viziti foiron</p> <p>15 Katalunaj homkasteloj</p> <p>16 Kamparanoj profitas de sciencoj kaj teknikoj</p> <p>18 Ŝanĝiĝo de Qiaodang-vilaĝo</p> <p>20 Sankta loko de la ĉinaj prapatroj</p> | <p>21 <i>EN ĈINAJ URBETOJ:</i>
En urbeto de pomoj</p> <p>24 Grandaj atingoj en batalo kontraŭ koruptiĝo</p> <p>26 <i>ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:</i>
Edzigo de jaŭ-nacio</p> <p>28 <i>EL ĈINAJ GAZETOJ</i></p> <p>29 <i>LAŬ LA SILKA VOJO:</i>
Gvardio sur la Silka Vojo</p> <p>36 <i>ĈINA KULTURO:</i>
Idiomoj en la ĉina lingvo</p> <p>38 Nova fizionomio de Beihai</p> <p>40 <i>VIRINOJ KAJ INFANOJ:</i>
Tago de ĉinaj virinoj</p> <p>42 Amo al Ĉinio</p> <p>44 Eksploato de biologiaj riĉfontoj en Yunnan</p> <p>46 <i>KURANTAJ AFEROJ</i></p> <p>48 La patro kaj birdoj (Novelo)</p> <p>50 <i>GALERIO:</i>
Koloraj fajencaj amuzistoj
<i>SUR LA KOVRILO KAJ DORSKOVRILO:</i>
Terakotaj militistoj en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio</p> <p>2 Ĉe la sunsubiro</p> |
|--|---|

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Yunnan (p. 44)
2. Zhuolu-gubernio (p. 20)
3. Zangjiazhuang (p. 21)
4. Beihai (p. 38)
5. Fujian-provinco (p. 16)
6. Ŝanhajo (p. 4)



Ĉu la vivo de malriĉaj urbanoj garantiata?

de JI PING

Mi proponas, ke EPĈ daŭre, multflanke kaj sincere informos pri la vivo, vivpano kaj vivnivelo de la ĉina popolo.

S. ZOLTAN (Hungario)

ANTAŬ pli ol 10 jaroj, en Ĉinio se iu enspezis 10 000 juanojn en unu jaro, multaj aliaj rigardis lin "elsaltulo".

Nun kvankam estas malmultaj ĉinoj, kiuj unujare enspezas po centmil juanojn, tamen ili ne plu estas tre raraj en Ĉinio. Antaŭ ne longe raporto far la Ŝtata Statistika Buroo montris, ke en la 9-a jardeko ĝenerale pligrandiĝis la enspezoj de la ĉinaj loĝantoj urbaj kaj kamparaj. En 1994 la averaĝa enspezo de la urbanoj estis 4 538 juanoj, 5 milionoj da familioj enspezis en la jaro po pli ol 50 000 juanojn kaj pli ol miliono da familioj posedas ĉiu havaĵon en valoro de pli ol miliono da juanoj.

Samtempe kun tio, ankoraŭ parto da urbaj loĝantoj vivas malriĉe. Laŭ statistiko de 1994 estas ĉ. 12.5 milionoj da malriĉaj loĝantoj, nome ĉ. 5% de la urbanoj de Ĉinio. Ili ĉiumonate enspezas po 160 juanojn. Kvankam ili vivis simple, tamen pro prezaltiĝo kaj aliaj faktoroj iliaj enspezoj ne kovris iliajn elspezojn. Kaj tiel estis proponita la minimuma vivgarantia linio por la urbanoj.

Junie de 1993 informo en ŝanhaja ĵurnalo vekis atenton de la koncerna fako de la magistrato. La informo konigis vivon de iuj nelaborpovaj maljunuloj, kiuj ne havas pension nek gefilojn. Antaŭe la koncerna fako helpis la senfilajn kaj nelaborpovajn maljunulojn per 50-100 juanoj monate. Estis pli ol 50 tiaj maljunuloj el la 40 000 loĝantoj sole en Huayang-kvartalo de Changning-distrikto. El tio oni povis scii, ke la nombro de tiel mizeraj maljunuloj en Ŝanhajo ne estas malgranda. Krome, ankaŭ troviĝis iuj malriĉaj oficistoj kaj laboristoj en Ŝanhajo, kiuj ricevis malmulte da enspezoj aŭ tute ne havis enspezojn pro malprofito de siaj entreprenoj, kaj iuj malnovaj ŝanhajanoj, kiuj laboris en aliaj lokoj kaj post emeritiĝo revenis al Ŝanhajo kun malgranda pensio.

Pro ĉio ĉi Ŝanhajo la unua en Ĉinio ekpraktikis la sistemon de minimuma vivgarantia linio, kiu difinas, ke la normo de la meznombra monata enspezo de la familianoj estu almenaŭ 220 juanoj, la nesufiĉa parto estu pagita de urba aŭ distrikta departemento de civilaj aferoj. Tuj poste respondis al Ŝanhajo aliaj dekelkaj provincoj

kaj municipoj inkl. de Pekino, Guangdong, Fujian (Fuĝjan), Shandong, Jiangsu (Ĝjangsu), Zhejiang (Ĝeĝjang) kaj Guizhou (Gujĝoŭ). Laŭ la pasintjara prezindico pri la bazaj vivbezonaĵoj de la lokaj loĝantoj, ili ellaboris malsamajn normojn de la minimuma vivgarantia linio. Ekz. la normoj estas 380 juanoj de Zhuhai (Ĝuhaj), Guangdong-provinco, 340 juanoj de Shenzhen (Ŝengen), 210 juanoj de Pekino kaj Tianjin (Tjanĝin), 225 juanoj de Fuzhou, Fujian-provinco kaj 280 juanoj de Xiamen. La vivbezonaĵoj proponitaj de Xiamen inkludas rizon, kuiroleon, salon, mononatrian glutamaton, sojon, hejtajon, elektron, akvon, legomojn, viandon, domlupagon, vestaĵojn, sapojn, kuracadon, publikan trafikon kaj kromajn elspezojn. Oni ankaŭ promesas levi la normojn laŭ la prezaltiĝo.

La minimuma vivgarantia linio celas helpi du grupojn da homoj: la unua parto konsistas el senfilaj maljunuloj, malsanuloj kaj handikapuloj kaj la alia parto el portempaj malriĉuloj, kies enspezo ne atingas la normon de la linio pro portempa malprofito de la entre-

prenoj. Laŭ la nuna cirkonstanco la urbanoj kun malgrandaj enspezoj plejparte estas emeritoj, kaj la oficistoj kaj laboristoj malmulte salajrataj plejparte funkcias en la entreprenoj de presado, paperfabrikado, ekspluatado de petrolo, geologia prospektorado kaj tekstilado.

Antaŭ nelonge Duoĵi Cairang, ministro de la Ministerio de Civilaj Aferoj, diris en intervjuado, ke en Ĉinio nemalmultaj ŝtataj entreprenoj suferas de serioza deficiito kaj aperis multaj laboristoj kaj senlaboruloj vivantaj sub la minimuma vivgarantia linio. Por ke la reformado de la entreprena sistemo glate iru, Ĉinio jam komencis reformi asekuran sistemon pri pensio, senlaboreco k.a. Tamen la socia asekuro havas limigitajn sferojn kaj tempon kaj plie ne ĉiuj homoj povas eniri en la asekuran reton kaj la asekuroj ĝuas la asekuron

kun limdato. Samtempe kun reformado de la socia asekura sistemo, Ĉinio ellaboris la sistemon de la minimuma vivgarantia linio por solvi la viv-malfacilon de oficistoj kaj laboristoj nesolveblan de la asekuraj establaĵoj. Ĝi havas gravan signifon por garantii la bazan vivrimedon de la loĝantaro, ĝustatempe kaj efike solvi la malfacilojn en la vivo de la popoloj kaj garantii stabilecon de la socio.

En efektivigo de la sistemo Ĉinio havas multe da spertoj kaj helpis multe da malriĉaj loĝantoj, tamen la sumoj por helpado ĝenerale estas malgrandaj kaj kuŝas granda diferenco de la enspezo inter la popoloj. Por perfektigi la urban minimuman vivgarantian linion kaj helpsistemon, multaj urboj plurfoje grandigas la helpnormojn kaj samtempe donas al la malriĉaj loĝantoj multe da favoroj.

Emerita barbiro servas ĉe strato.



Ŝanhajo disponigas al la malriĉaj loĝantoj "verdan karton" por aĉeti rizon kaj oleon. Tiuj, kiuj havas tian verdan karton, estas nomataj "verdkartaj" loĝantoj. Ili ĉiumonate povas aĉeti bezonatajn rizon kaj oleon per moderaj prezoj en la difinita vendejo. Por tio la urbo elspezas miliardon da juanoj ĉiujare. En Ŝanhajo 146 000 loĝantoj ricevis la "verdan karton".

En la urbo Shenyang, malnova industria bazo en nordorienta Ĉinio, aperis portempe malriĉaj loĝantoj pro senlaboreco kaj kolapso de entreprenoj. Koncerna departemento de la urbo helpas ilin en la vivo, enoficigo kaj produktado. Oni helpas ĉefe ilin altigi sian labor-teknikon, larĝigi enoficigan vojon kaj havigi al ili pli da laborŝanĝoj, por ke ili radikale liberigu el malriĉeco. Por tio la urba registaro faris decidon privilegie doni licencojn al tiuj tre malriĉaj petantoj pri individua entreprenado kaj permesi al ili ne pagi la negocan imposton kaj industri-komercan administran imposton; garantii laborŝancon en alia entrepreno al unu el la membroj de la tre malriĉaj familioj, se kies du aŭ pli ol du membroj de tia familio laboras en malprofita entrepreno, permesi al la gefiloj de la tre malriĉaj familioj senpage lerni en elementlernejo kaj mezlernejo, se tiuj familioj ne malobservis la politikon pri naskolimigo; kaj ne pagigi al la tre malriĉaj familioj por 10 kubmetroj da gaso kaj 5 kubmetroj da akvo ĉiumonate.

Efektivigo de la minimuma vivgarantia linio en Xiamen estis tre ŝatata de la malriĉaj loĝantoj. Ĝi alportis interhelpan moron en la urbo. La Konstrua Mekanika Akcia Limigita Kompanio kaj aliaj 13 profitodonaj ŝtataj entreprenoj de la urbo iniciatis interhelpan fonduson de entreprenoj, kiu kolektis 1.18 milionojn da juanoj por solvi malfacilojn por la oficistoj kaj laboristoj de la malmulte profitaj entreprenoj.

En Xiamen la minimuma vivgarantia linio jam praktikiĝas en la kamparo. ■

ĈEL — 45-jara

LA Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) estis fondita en 1951. Ĉi-jare ĝi fariĝas 45-jara. Retrospektive rigardante la pasintajn 45 jarojn, oni trovos, ke ĈEL iris ne glate.

Nur 2 jarojn post sia fondiĝo, ĈEL renkontis malfavoran influon el eksterlando. Ĝi estis devigita ĉesigi siajn aktivadojn, ankaŭ la revuo EPĈ eldonata de ĝi ĉesis aperi.

Feliĉe, tiu periodo ne daŭris longe. En 1956 tiu malfavora influo estingiĝis, ĈEL jam povis sendi sian delegacion al la 41-a UK okazinta en Kopenhago. Kaj poste


EPĈ reaperis, la aktivadoj de ĈEL revigliĝis. En decembro 1964 ankaŭ Radio Pekino (nun Ĉina Radio Internacia), kiu elsendas en multaj lingvoj, komencis uzi nian lingvon. Sed en 1966 okazis la kultura revolucio en Ĉinio. En tiu politika kampanjo la nacia kulturo de Ĉinio estis grandskale damaĝita, por ne paroli pri la Esperantomovado. EPĈ, kiel informa revuo por eksterlandanoj, redaktata laŭ ultramaldekstra vidpunkto, daŭre aperis, ankaŭ Radio Pekino daŭrigis sian Esperanto-elsendon, kaj tiel la Esperanto-afero ne estis tute strangolita en Ĉinio.

En 1976 tiu terura katastrofo, kiu daŭris dek jarojn, finfine finiĝis. Ĉiuj aferoj, precipe la kultura afero, refoje prosperas kun plena vicleco. Kompreneble, nia Esperanto-movado ne estis escepto. Sekve, en 1978 ĈEL sukcesis sendi siajn delegitojn al Bulgario por ĉeesti la Varnan Universalan Kongreson. Dum tiu Kongreso la ĈEL-delegitoj havis intiman konversacion kun la estraranoj de UEA, kaj pliiĝis ilia interkompreniĝo.

Tiam ĈEL konsciis ke, por disvolvi siajn aktivadojn mondscale, estas nepre necese ke la ĉina Esperanto-movado havu intiman interligon kun la monda organizo UEA. Kaj UEA, siaflanke konstatas ke, akcepti ĈEL, landan organizon de tia granda lando kia Ĉinio, kiel sian membron estas sendube utile kaj signifoplene. Tial, post nelonge, jam dum la Stokholma Kongreso en 1980, ĈEL sukcesis aliĝi al UEA.

Post tio la ĉina Esperantomovado progresis sufiĉe rapide. Multaj personoj, precipe gejunuloj, ekinteresiĝis pri nia lingvo kaj vizitis Esperanto-kursojn. Lokaj organizoj ekfunkciis unu post alia en diversaj provincoj kaj urboj. En 1981 ĈEL restarigis sian organon "La Mondo", fame konatan kiel Esperanto-revuo en la 30-aj jaroj. Kaj samtempe, la Ĉina Esperanto-Eldonejo ekfunkciis. Je la fino de

S-ro Zhang Qicheng (maldekstre) kaj s-ro Zaleski-Zamenhof



tiu jaro, dank' al la klopodo de ĈEL, la organizo "Amikoj de Esperanto", kiu havis s-ron Chu Tun-an, vicprezidanton de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, kiel sian prezidanton kaj multajn eminentulojn kiel siajn membrojn, fondiĝis en varma etoso. Tio ja estas senprecedenca en la historio de la ĉina Esperantomovado. La laboro de ĈEL do aspektis tre vigla kaj sukcesoplena. Pro tio, en la UK en 1983, kiu okazis en Budapeŝto kun proksimume 5 000 aliĝintoj, ĈEL havis la honoron akcepti la Fynepokalon donacitan de UEA.

Post la aliĝo al UEA kaj la granda progreso de la movado ni havis la ideon, ke maturiĝas la kondiĉoj por realigi la postlasitan deziron de nia estimata marŝalo Chen Yi, t.e. okazigi Universalan Kongreson en Pekino. Ni prezentis nian peton al la estraro de UEA kaj multfoje interkonsiliĝis kun ĝi. Okazigi UK en Ĉinio signifas plidivastigi Esperantomovadon en vasta lando, kiu havas longan historion, miliardon da loĝantoj kaj brilan kulturon. Do, la estraro de UEA volonte akceptis nian peton kaj donis al ni grandan helpon. Rezulte, en 1986 la 71-a UK okazis en Pekino. Aliĝintoj al la kongreso estis neatendite multaj. Ĝi fariĝis la plej granda kongreso ekster Eŭropo.

Ni esperis, ke tiu sukcesa kongreso donos al ni pli favoran cirkonstancan. Sed nia espero ne realiĝis, eĉ male, malfavora kondiĉo denove nin trafis. La kaŭzo estas, ke la politiko de pordomalfermo de la ĉina registaro pli kaj pli bone praktikiĝis kaj la interrilatoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj multe disvolviĝis, sekve lernado de fremda lingvo furoriĝis. Por la ordinaraj ĉinoj, lerni fremdan lingvon signifas lerni la anglan, ĉar nuntempe la plej vaste uzata lingvo en la internacia komunikado estas nenio alia ol la angla. Tio estas realo neignoblebla. Alfrontante la fervoron por anglalingva lernado, la malforta lingvo Esperanto nature ne povas teni sian pozicion. Tamen



Ĉinaj, japanaj kaj koreaj esperantistoj en la 14-a Komuna Seminario en Tianjin

en tiu malfavora situacio la ĉina Esperantomovado tute ne stagnis. Ni eldonis EPC kiel kutime kaj la Ĉina E-Eldonejo aperigis dekojn da specoj da libroj, kiaj la ĉina klasika novelo "Ruĝdoma Sonĝo" kaj "Mirrakontoj de Liaozhai". ĈEL sukcesis kunvoki la 2-an kaj 3-an landajn kongresojn respektive en 1991 kaj 1995 en Tangshan kaj Chongqing (Ĉongĉing). En 1992, kunlaborante kun la Qingdao-a E-Asocio, ĈEL organizis tre pompan Pacifikan Kongreson de Esperanto en tiu bela apudmara urbo. Kaj ĉi-jare, la Unua Azia Kongreso de Esperanto okazos en Ŝanhajo dank' al la penado de tieaj gekolegoj. La 5-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazos en Pekino ĉi-jare. "La Mondo", malgraŭ ĉiaj malfaciloj, aperis ankoraŭ regule. La legantoj de "La Verda Spiko", organo de la Guangdong-a E-Asocio, povas ricevi tiun enhavoriĉan trimestran gazeton. Kaj ankaŭ "Penseo", la monata beletra revuo, aperas por riĉigi la Esperantan beletran kampon. Organize, ne nur la lokaj grupoj en diversaj provincoj kaj urboj daŭre aktivis diversmaniere, kaj eĉ kelkaj fakaj grupoj, kiel la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio, Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio, Ĉina Filatela Esperanto-Asocio, Ĉina

Medicina Esperanto-Asocio kaj Ĉina Veĝcia Esperanto-Asocio, estis sinsekve fonditaj en la lastaj jaroj. Krome, la SAT-anoj en Ĉinio ankaŭ dufoje kunvenis kun siaj kolegoj el eksterlando. Ĉio ĉi tio montras, ke nia pasinta laboro donis relative firman bazon al la ĉina Esperantomovado malgraŭ diversaj malfaciloj.


Esperanto estas bela lingvo, ĝi praktike utilas certgrade por internacia komunikado, krome, ĝi estas lingvo por interpopola interkompreniĝo kaj amikiĝo kaj enhavas la noblan idealon de homarismo, ĝia ĉarmo kaj allogo ja estas neforigeblaj pro ĉia kaŭzo. Do, alfrontante la severan situacion, ni preferinde restu sobraj unuflanke kaj nedepremitaj aliflanke, kaj rigardante antaŭen ni des pli devas esti fidoplenaj.

Oni povas senfanfarone diri, ke la laboro de ĈEL dum la pasintaj 45 jaroj estis fruktodona. Nur se ĈEL daŭre sindone penados kaj laboros senlace, ĝi certe kontribuos pli multe al E-movado ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo en la venontaj jaroj. ■

*La aŭtoro estas iama ĝenerala sekretario de ĈEL kaj ĝia vicprezidanto kaj nun ĝia honora prezidanto kaj honora membro de UEA.

Zeng Hojaŭ, prezidanto de la Pekina E-Asocio

de SUN AIJUN



Zeng Hojaŭ en kunveno de la Pekina E-Asocio

SEPTEMBRE de 1995, s-ro Zeng Hojaŭ revenis en sian hejmlokon Sichuan-provinco por partopreni la 3-an Ĉinan Kongreson de Esperanto okazintan en Chongqing (Ĉongĉing). Okaze de la 50-jara jubileo de la venko de la kontraŭfaŝisma milito de la mondaj popoloj kaj tiu de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo, li faris prelegon kun la titolo "Per Esperanto por la paco". Li raportis, kiel li kaj aliaj esperantistoj kune disvastigis Esperanton kaj per ĝi propagandis justecon, batalis kontraŭ la agresa milito kaj defendis la pacon antaŭ 50 jaroj en Chongqing.

PER ESPERANTO POR LA PACO

Oktobre de 1938, japanaj agresantoj okupis Wuhan en la meza parto de Ĉinio. S-ro Ĵelezo, redaktoro de la duonmonata gazeto "Heroldo de Ĉinio", kaj aliaj esperantistoj venis de Wuhan en Chongqing por daŭre eldoni la gazeton. Septembre de 1939, ili funkciigis E-kurson en la urbo. Fininte la lernadon en la elementa E-kurso, 17-jara Zeng komencis la lernadon en la mezgrada.

Post nelonge la klasĉambro de la E-kurso estis bombardita de japanaj agresantoj. La 15-an de marto 1940 s-roj Ĵelezo, Liu Ren (Liŭ Ĵen) kaj aliaj

ekfunkciigis korespondan E-lernejon. Ili luis simplan ĉambron de kamparano en antaŭurbo de Chongqing kiel sian oficejon. En decembro de 1940 Zeng eklaboris kiel instruisto de la elementa E-kurso de la lernejo. Li kaj liaj instruistoj Venlo Fon kaj Eltunko laboris en la ĉambro sub olelampo, kelkfoje eĉ ĝis profunda nokto. Post laboro ili dormis tie sur malnovaj bambuaj litoj kaj skribotabloj. Portante surdorse pezajn lernomaterialojn kaj ekzercajn paperojn, ili piediris 1-2-foje ĉiun semajnon 5 km al la poŝtoficejo ĉe la piedo de la monto por sendi ilin al la lernantoj. Ili vivis per tre malgranda lernopago. Ili portis vestojn kun flikaĵoj kaj pajlosandalojn somere.

Menciante la pasintecon, Zeng diris kun emocio: "Dank' al Esperanto, ni restis optimismaj malgraŭ la peza vivo."

De 1940 ĝis 1946 en la lernejo lernis pli ol 3 000 personoj kaj multaj el ili daŭre studis Esperanton post finlernado en la mezgrada E-kurso. Kaj poste ili fariĝis Esperantaj aktivuloj en diversaj lokoj de Ĉinio.

En tiu periodo Zeng laboris antaŭtagmeze en la redakcio de "Heroldo de Ĉinio" kaj posttagmeze en la lernejo. Li esperantigis artikolon pri generalo Peng Dehuai, kiu komandis la Oka-vojan Armeon por gajni la venkon en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Dank' al kontaktiĝo kun kontraŭfaŝisma batalantino kaj japana esperantistino Verda Majo kaj korea Esperanta poeto Elpin, li bone konis la gravan rolon de Esperanto en internacia komunikado. La gazeto "Heroldo de Ĉinio" konigis al la legantoj la rezistmilitan situacion, popolan vivon kaj literaturaĵojn. De 1938 ĝis 1945 la gazeto estis distribuita en 850 urboj de 63 landoj kaj regionoj. Dank' al ĝi, diverslandaj esperantistoj konis la justecon de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo. Nemalmultaj legantoj skribis al la redakcio kaj esprimis siajn simpatiojn, subtenon kaj kuraĝigon al Ĉinio.

GVIDANTO DE LA PEKINA E-ASOCIO

De 1946 ĝis 1949 Zeng laboris kiel raportisto kaj politika helpanto en universitato. En 1949 li forlasis Chongqing kaj venis en Pekinon. Li funkciis kiel sekretario de ministro, poste li preparis sin por fondi la Hejtaĵ-industrian Eldonejon kaj laboris kiel ĝia vicestro. Li iam laboris en Ningxia (Ningŝja) kaj Qinghai (Ĉinghaj) en nordokcidenta Ĉinio. Li multfoje ŝanĝis sian laboron kaj ne havis kondiĉojn por okupiĝi pri E-movado, sed lia amo al Esperanto restis sama kiel antaŭe. Legado de "El Popola Ĉinio" kaj vizito de samideanoj ege plaĉis al li.

En 1980 Zeng revenis en Pekinon kaj ekfunkciis kiel vicestro de la Ĉina Elektra Eldonejo. Li denove aktiviĝis en la ĉina E-movado. Li preparis sin por starigi la Pekinan E-Asociacion. En januaro de 1981 fondiĝis la Pekina E-Asocio kaj li fariĝis ĝiaj vicpre-



Zeng Hojaŭ (meze), Ge Baoquan (dekstre), honora prezidanto de la Pekina E-Asocio, kaj veterana esperantisto Sha Di



Zeng Hojaŭ (maldekstre) kaj aŭstraliaj s-aninoj en Pekino



Zeng Hojaŭ kaj japana s-ano Yosimi Umeda en Pekino

zidanto kaj ĝenerala sekretario.

Li donis multan atenton al propagando de Esperanto. Dank' al propono kaj kuraĝigo de li kaj aliaj estraranoj, membroj de la asocio kaj raportistoj de ĵurnaloj, gazetoj, radio- kaj televido-stacioj skribis pli ol 100 artikolojn pri la E-movado en Pekino, publikigis ilin en pli ol 20 ĉinaj kaj alilandaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj elsendis ilin per radio kaj televido. La Pekina E-Asocio, la Ĉina E-Ligo kaj la redakcio de EPĈ kaj aliaj okazigis ekspozicion, prezentadon kaj konkurson de Esperanta prelego por festi la 100-jaran jubileon de la naskiĝo de Esperanto kaj ankaŭ tekunsidon por la 130-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

Inter 1980 kaj 1989 Zeng Hojaŭ kun aliaj respondeculoj de la eduka komitato de la Pekina E-Asocio funkciigis 120 E-kursojn, en kiuj lernis pli ol 6 000 personoj.

Zeng kaj aliaj estraranoj de la Pekina E-Asocio akceptis ĉ. 300 esperantistojn, inkl. de tiuj de 19 Esperantaj delegacioj, el pli ol 40 landoj kaj starigis intimajn rilatojn kun d-ro Tonkin, iama prezidanto de UEA, s-ro Umeda Yosimi, iama vicprezidanto de UEA, s-ro Simo Milojeviĉ, ĝenerala direktoro de UEA, kaj s-ro B.Vogelmann, honora membro de UEA, k.a.

En la pasintaj pli ol 10 jaroj, sub lia gvido la Pekina E-Asocio eldonis 14-specajn Esperantajn ler-

Zeng Hojaŭ (dekstre) kaj Bakin (la dua de maldekstre), veterana e-isto kaj fama verkisto



Zeng Hojaŭ (la unua de maldekstre en la fronto) en la 65-a UK

nolibrojn kaj vortarojn, okazigis jarkunvenojn kaj prelegojn, organizis Esperantajn prezentadojn ktp.

FIDELA AL ESPERANTA IDEALO

En 1993 Zeng aliĝis al la Pasporta Servo de TEJO. En 2 jaroj li akceptis hejme 9 esperantistojn el 5 landoj. Menciante tion, li diris: "Mi faris tion kun la celo oportuni al alilandaj esperantistoj, ĉar ankaŭ ni estis varme akceptitaj de alilandaj esperantistoj. Diversalantaj esperantistoj estas intimaj amikoj kaj Esperantujo — interhelpa familio."

Zeng aranĝis aktivadojn por alilandaj esperantistoj, kiuj venis al Pekino, akompanis ilin en vojaĝo kaj helpis ilin aŭdigi sian voĉon en la Ĉina Radio Internacia. Julie de 1994, antaŭ ol partopreni en la 79-a UK en Seulo, s-ro Snorre Benum, Esperanta instruisto de Norvegio, restadis en Pekino kaj insistis loĝi ĉe Zeng. Poste, Zeng sendis junan membron de la Pekina E-Asocio akompani lin en vojaĝo al aliaj 9 urboj de Ĉinio. Dum la vojaĝo li estis varme bonvenigata de lokaj esperantistoj.

Kelkajn jarojn antaŭe, lia maldekstra femuralo estis vundita kaj li iras helpe de lambastono. Malgraŭ tio, li restas entuziasma pri E-movado. Li ofte diris al junaj esperantistoj: "Esperanto estas internacia lingvo kaj montras sian utilecon nur en internacia kontakto. La idealo de Esperanto estas forigi per la lingvo barilon inter la homoj, akceli interkomprenon kaj amikecon kaj progresigi la socion. En la merkata ekonomia sistemo ankaŭ Esperanto alfrontas diversajn defiojn, sed mi kredas, ke la perspektivo de Esperanto estas bela." ■

ESP-NOVAĴOJ

● La 3-an de decembro 1995, pli ol 30 pekinaj esperantistoj renkontiĝis en la restoracio administrata de esperantisto por festi la 136-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Dum la renkontiĝo s-ro Hou Zhiping (Hoŭ Ĝiping), vicestro de la redakcio de EPC, faris prelegon titolitan "Sindonemo de Zamenhof" kaj s-ro Laŭlum, vicprezidanto de la Pekina E-Asocio, raportis pri sia vizito al Japanio en novembro 1995. Estontece pekinaj esperantistoj regule renkontiĝos en la restoracio. (Wang Hanping)

● La 30-an de aŭgusto, la 1-an kaj 2-an de septembro 1995 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis 4 seriojn da poŝtmarkoj "La 1 500-jara jubileo de la templo Shaolin", "Kulturaj relikvoj de Tibeto", "Raraj bestoj" kaj "La 50-jara jubileo de la venko en la bataloj kontraŭ japana faŝismo". En la emisaj tagoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de tiuj 4 poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● La 3-an de majo 1995, s-ino Juscelino Gama kaj ŝia fratino Leda Gama faris ekspozicion kaj prelegon en la beletra fakultato de la urbo Jau de Brazilo. Ĉeestis ĉ. 140 homoj. Je la 17-a de majo okazis E-ekspozicio en fama katolika lernejo Notre Dame. Ĝi estis bone akceptita kaj multe vizitata ne nur de la gelernantoj, sed ankaŭ de iliaj gepatroj kaj instruistoj. Je la 20-a kaj 21-a de junio la E-ekspozicio okazis ankaŭ en la Matematika Instituto de Unicamp kaj ricevis grandan sukceson. Centoj da homoj vizitis la ekspozicion, kaj 142 montris intereson ekstudi E-on kaj lasis siajn adresojn, celante estontajn kontaktojn. (Juscelino Gama)

● En februaro 1995 ekestis Komisiono pri interlingvistiko kaj esperantologio kadre de la Filio en Timisoara de Tutlanda Asocio de Sciencistoj de Rumanio. Jam en majo ĝi okazigis sciencan simpozion en Timisoara, kun 23 referaĵoj. La 24-an de sept. oni organizis publikan debaton en la salono de la Akademia Biblioteko de Timisoara. La referaĵon "Rolo de la intelektularo en la disvastigo de Esperanto" prezentis prof. I. F. Bociort. Ĉeestis 46 personoj. (I. F. Bociort)

● Okazos Trilanda Renkontiĝo de Belgio, Nederlando kaj Germanio en Stokkem, Belgio, je la 12-a de majo 1996. Prelego pri Moza ekologio kaj vizito de la plektarta muzeo estas antaŭvidataj. Informoj kaj aligiloj ĉe: Jan Bovendeerd, Veenmosstraat 3, B-3650 Stokkem-Dilsen, Belgio. (Klaus Hogen)

● Okazos skolta tendarego Loisto '96 en Hango, Finnlando, 18-26 julio, 1996. Partoprenos pli ol 10 000 geskoltoj el la tuta mondo. Skolta Esperanto-

Ligo (SEL) planas organizi kunan loĝadon de Esperanto-skoltoj en propra tendartrupo kaj aranĝos SEL-kunsidon, SEL-standon, elekteblan agadponton pri Esperanto kaj pli ampleksan Esperanto-kurson por malgranda grupo da partoprenantoj. Bonvena estas subteno de la tuta Esperanto-movado por ilia agado. Pliajn informojn donas la nacia reprezentanto de SEL en Finnlando: Carola Antskog, Mattkarr, 25700 Kimito. (A. M. Ritamaki)



F-ino Ariedne A.Davi (dekstre) kaj vizitantoj



Propagando de Esperanto surstrate

● Ago-Tago en Meksiko okazis la unuan sabaton de oktobro 1995, estis 4 grupoj lokitaj en la plej gravaj stratoj. La partoprenintoj informis al la publiko la ekziston kaj valoron de Esperanto kaj la neceson de efika tutmonda komunikado. Por pli bone sukcesi kaj kapti la publikan atenton, la partoprenintoj vestis sin per Esperanto-ĉemizo kaj portis Esperantan flagon, grandan afiŝon, flugfoliojn kaj diversajn Esperantajn revuojn.

(J. kaj G. Vega Acosta)

Respondi — responsi

de BRUNO VOGELMANN
(Germanio)

Estas strange, ke malĝustaj kunmetitaj vortoj ofte vivas longtempe, ekzemple la fatala “respondeci”. Bedaŭrinde ĝi estas trovata eĉ en PIV p. 919, kie ni legas: “respondeco 2: sindevontigo porti la rezultojn de ago aŭ faro.” Tiu difino estas nesufiĉa, ĉar “sindevontigo” signifas nur devontigi sin mem pri la rezultoj de ago aŭ faro. Fakte temas pri responseco ankaŭ se la aganto ne nur sindevontigas libervole, sed ankaŭ se li estas devigata de ekstere, de leĝo, de superuloj aŭ de alia kaŭzo.

Ni devas klare diferencigi inter “respondi” kaj “responsi”, inter respondo kaj responso, inter respondeco kaj responseco, inter respondeca kaj responsa, inter responde kaj response.

Respondo: estas repliko je demando aŭ ago de alia persono aŭ situacio kaj konsistas en vorta informo aŭ en ago farata.

Responso: estas farenda ago, necesa por rebonigi situacion ekstantan pro ago de kulpulo/kaŭzanto.

Respondeco: estas vorto, kiu apenaŭ aŭ tre rare havas senceon en ia frazo. Ĝi signifus “eco de respondo” kiel “beleco” signifas “eco de belo.” Ĝi ne enhavas devontigon.

Responseco: estas la stato, en kiu estas homo jam antaŭ sia ago. Tiu stato enhavas la devon priatenti ĝustan konduton al personoj, objektoj, situacioj, por ke ne oka-



La aŭtoro

zu noco aŭ alia nedezirata efiko el lia ago kaj sinteno. Ekzemple: la vendisto portas la responsecon pri bona kvalito de varo.

Respondi: signifas repliki al demandinto donante al li la deziratan informon aŭ plenumante deziratan agon. Ekzemple: La lernanto respondas al la demandinta instruisto.

Responsi: signifas porti la devontigon zorgi pri plejble bona rezulto de agoj aŭ faroj. Ekzemple: La direktoro responsas pri la sukceso de la entrepreno.

Responda: koncernas ion en rilato kun la respondo. Ekzemple: La respondeca tono estis malafabla.

Responsa: portanta la devon de responsulo. Ekzemple: La gepatroj estas responsaj pri siaj infanoj. Krome adverbe:

Responde li informis min precize.

Response li ne agis senpripense.

La lingva misuzo de “respondeci” povis okazi, ĉar dum la evoluo de la lingvoj en pluraj eŭropaj lingvoj la vorto por “responsi” estis formita el la vorto por “respondi.” Interese, tio ne okazis en la latina lingvo, kie ekzistas du diferencaj vortoj. Tamen, se temas pri la nocio “responsi”, la romanaj (latinidaj) lingvoj utiligas tre ofte formojn kun la radiko “respons”. En intereso de klareco de nia Internacia Lingvo necesas forigi la lingvan malpuraĵon de “respondeci” kaj ties derivaĵoj.

Ni ĉiuj estas responsaj pri klara, plejble ankaŭ logika lingvo. Ni devas konsideri, ke la esperantistoj, kiuj ne parolas hindeŭropan lingvon, bezonas klarecon de la nocioj. ■

Numeraloj

— pripensinda simpligo

de BRUNO VOGELMANN
(Germanio)

Ĉina lingvisto Li Shijun publikigis en EPĈ 6/1992 atentindan artikolon “Promenado inter la numeraloj” pri nelogika kaj por neeŭropanoj malfacile komprenebla sistemo ene de la numeraloj. Eble nur ano de tute diferenca lingvo kapablis ekkoni tiun problemon tiom klare. Li konstatas, ke “en la numeralan sistemon de Esperanto enŝteliĝis kelkaj neregulaĵoj, kio iom komplikis la sistemon. Ekzemple... ekzistas kelkaj variaj numeralaj substantivoj kiel ekzemple *nulo*, *miliono*, *miliardo* kaj *biliono*, kiuj estas uzataj alimaniere ol la dekduo.” La dekduo estas laŭ la aŭtoro la nevariaj numeraloj de nul, unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek ĝis cent kaj mil.

La dekduaj numeraloj estas uzataj sen iu aldonaĵo. Ekzemple 23548 estas legata dudektrimil kvincentkvardek. Tute simple kaj logike!

Alia afero estas, se ni rigardas pli grandajn nombrojn, ekzemple: En urbo vivas 1 000 001 homoj. Ni povas laŭtlegi:

1. En la urbo vivas miliono da homoj kaj unu homoj.
2. En la urbo vivas miliono da homoj kaj unu homo.
3. En la urbo vivas miliono unu homoj.

La aŭtoro donas pluajn ekzemplojn kaj montras la problemojn kaj kontraŭdirojn ekestantajn pro la ekzistado de du specoj de numeraloj. Li rekomendas utiligi la pli simplajn numeralojn *miljon*, *miljard*, *biljon* ktp., kiuj ne postulas la superfluan kaj ĝenan *da*. Do ni povos estonte legi:

1 000 001 homoj = miljon unu homoj

4 324 648 homoj = kvarmiljon tricentdudekkvarmil sescentkvardekdek homoj

Mi proponas — pro la kompleteco kaj sistemeco — la jenajn novajn numeralojn:

	ĝisnunaj	novaj
10 ⁶	miliono	miljon

10 ⁹	miliardo	miljard
10 ¹²	biliono	biljon
10 ¹⁸	triliono	triljon
10 ²⁴	kvadriliono	kvarjon
10 ³⁰	kvintiliono	kvinjon
10 ³⁶	sesiliono	sesjon
10 ⁴²	septiliono	sepjon
10 ⁴⁸	oktiliono	okjon
10 ⁵⁴	noniliono	naŭjon
10 ⁶⁰	dekiliono	dekjon

Laŭ la sama metodo la ĉina aŭtoro rekomendas la radikojn *kelk*, *mult*, *plur*, por eviti la iom strangan vorteton *da*, do ekzemple: *kelk* fruktoj, *mult* akvo, *plur* paĝoj, kvankam en tiu kazo ni povas ankaŭ diri: kelkaj fruktoj, multa akvo, pluraj paĝoj, kio sonas por multaj personoj pli agrable.

Fine la aŭtoro mencias la vor-

tojn kun -om. Kial ne demandi: Kiom floroj? kaj respondi: tiom floroj! iom floroj! neniom floroj!

Estas rekomendinde legi la artikolon de la aŭtoro en originalo, ĉar li pli detale montras la interligitecojn. Bedaŭrinde tie ĉi eblis nur redoni lian prezentaĵon en tre kurta formo.

Resume: ne temas pri fundamenta ŝanĝo, sed nur pri racia kaj utila vortfarado kaj pri utiligado de gramatikaj ebloj. Tia nova utiligo helpas multe al esperantistoj el ne-eŭropaj lingvoregionoj pli bone kompreni kaj manipuli la lingvon.

Estus bone, se la Akademio de Esperanto pritraktus kaj esplorus tiun problemon kaj donus aprobon. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Privataj entreprenistoj serĉas perantojn, kiuj bone parolas la hungaran aŭ slovakon lingvon. Adreso: Amika Rondo de e-istoj, ZS. Vizslay, 044 05 Janik 5, Slovakio.

* Speggorin Bernard, 35-j., dez. kor. pri vivo en diversaj landoj kaj aliaj temoj. Adr.: 92, Avenue de Montredon, 13008 Marseille, Francio.

* Liao Shanbin dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj. Adr.: Xingwang Gouwiaobu, Qinzhen Lu, Jitianzhen, 513224 Lianshanxian, Guangdong, Ĉinio.

* Puller Istvan, 17-j. knabo, dez. kor. kun ĉinaj samaĝuloj. 'O utca 5, 1066 Budapest, Hungario.

* 9-14-j. geknaboj dez. kor. kun pliaĝaj personoj, kiuj amas infanojn kaj pretas patroni ilin lingve. Adr.: Eugeno S. Perevertaj-

lo, ab/k 140, Poŝtamt, 700000 Taŝkent, Uzbekistano.

* Juho Ilmari Vattulainen volas kor. tm., kolektas poŝtkartojn, monerojn kaj poŝtmarkojn, kaj ankaŭ malmultekostajn monbiletojn. Adreso: Rantakylantie 64, 81160 Romppala, Finnlando.

* Gesamideanoj tm. sendu al mi leteron aŭ bk. kun vortoj — paco — justeco — libereco — en Esperanto kaj en via lingvo. Eliana Sessegolo, Via San Giorgio 29, 36015 Schio (VI), Italio. Se ni ricevos multe da leteroj, ni organizos ekspozicion.

* Brigitte Faverial, 36-j., dez. kor. kun tutmondaj gesamideanoj pri diversaj temoj. Adr.: 22b, rue Charnay Frachet, 24000 Perigueux, Francio.

* Santiago Martin dez. kor. kaj interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn kun ĉinaj filatelistoj. Adr.: Fray Juan 25-6°K, 48013 Bilbao, Hispanio.

* Odeni Barbosa dez. interŝanĝi antikvajn revuojn, ĵurnalojn kaj gazetojn. Povas pagi ankaŭ per libroj, pk. kaj pm. Adr.: Caixa Postal 794, BR 89801-970-Chapeco SC, Brazilo.

* Mara T, 35-j. biologo kaj ŝia

filino, 14-j., ŝatas naturon kaj turismon, dez. kor. kaj trovi bonan amikon. Adr.: Box 150, Riga LV-1050, Latvio.

* E-Societo "Libero" kaj ĝiaj membroj dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Str. Pliska No 36, BG 7020 Ruse, Bulgario.

* Li Yamin dez. kor. tm. Adr.: P.O.Box 5, Qiqihaer, 161006, Ĉinio.

* Huang Zhong, 22-j., dez. kor. kun esperantistoj pri komuna entrepreno, kunlabora produkto, var-interŝanĝo kaj kompensa komerco. Adr.: Huangzhaicun 08 Hao, Xipo Guanqu, Donglizhen, Leizhou, Guangdong, Ĉinio.

* Li Xiuqi, 26-j. komputilistino. Hobioj: pm., bk., angla lingvo, moroj, kantado, masaĝo, kuretado, volano, kuirarto kaj vojaĝo. Adr.: Box 58, Y-944, University of Post & Telecommunication, 100088 Beijing, Ĉinio.

* Jiang Xiafang, 23-j. komputila asist-inĝenierino, interesiĝas pri pm., bk., muziko, angla lingvo, moroj, sportoj kaj vojaĝo. Adr.: You-Dian Xincun 22-502, Shentangqiao, 310012 Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio.

Viziti foiron

de ZOU GUOWEN

MIA 68-jara patro vizitadis foiron en multaj jaroj.

En la 70-aj jaroj ni estis tre malriĉaj. Ĉiujare en la tempo, kiam mankis manĝaĵoj, la vilaĝanoj ofte malsatis. Sed mia patro ne ĉesis viziti la foiron en la urbeto. Li ellitiĝis kelkajn horojn antaŭ la matenkrepusko — ni loĝis en montvilaĝo pli ol 20 kilometrojn for de la urbeto. Li piediris 3 aŭ 4 horojn kaj je tagiĝo atingis la foirejon, kiu estis malprospera en tiuj jaroj. Mia patro vendis iom da sojfabloj, kokinoj kaj anasoj. Fine li aĉetis ĉiutagajn bezonaĵojn kaj revenis malsate — li domaĝis monon por aĉeti manĝaĵon.

En la 80-aj jaroj la vilaĝanoj profitis de lokaj riĉfontoj. Mia patro pli ŝatis viziti la foiron. Li aĉetis biciklon kaj portis per ĝi dekojn da kilogramoj da fungoj kaj bambuŝosoj al la foiro. Post

disvendado de tiuj produktaĵoj li satigis sin per bovlo da bongustaj vermiĉeloj. Li revenis, kantante kanzonojn.

En la 90-aj jaroj li anstataŭigis la biciklon per motorciklo. Ne plu necesas frue ellitiĝi. Mia patro ĝuas la foiron kun plezuro.

Antaŭ nelonge, ŝoseo etendiĝis al nia vilaĝo kaj aperis ankaŭ taksioj. Mia patro diris: “Mi estas maljuna, motorciklo estas iom danĝere por mi.” Do li veturas al la foirejo per taksio. Li vendas ne nur fungojn kaj bambuŝosojn, sed ankaŭ lignaĵojn kaj bambuaĵojn. En la foirejo li promenas por esplori. Li invitas promesplenan klienton al restoracio por intertraktado. Li diris al mi kun rideto: “Tio estas negoco.”

En vizitado de la foiro mia patro fariĝas pli kaj pli vigla. ■



MARTI GUERRERO COTS (Hispanio):

Katalunaj homkasteloj

Post legado de la artikolo "Arto de Homa Piramido en Shexian", 1-a numero de 1995, EPC, nia hispana leganto Marti Guerrero Cots opiniis, ke por la legantoj de EPC estus agrable koni la arton iom similan al la homa piramido, kiu estas ludata en lia hejmloko Katalunio. Pro tio li sendis al ni jenan tekston kaj kelkajn bildojn.

La Red.

EN Katalunio ekzistas pli ol cent grupoj, kiuj dum vilaĝaj festoj konstruas Homajn Kastelojn iom similajn al la arto de homaj piramidoj en Shexian.

La katalunaj grupoj estas nomataj "Homaj Kasteloj". Tiu ludo konsistas el supreniroj de unu sur la ŝultroj de alia, formante diversajn etaĝojn. Ĉiu etaĝo povas esti de unu, du, tri aŭ pli da homoj. Se la etaĝo estas formita de unu homo, oni nomas ĝin "Kolono"; se ĝi estas formita de du homoj, la nomo estas "Turo"; kaj se ĝi estas formita de tri aŭ pli da homoj, oni nomas ĝin "Kastelo".

Por konstrui kastelojn, oni faras unue gravan bazon formitan de diversaj rondoj da ludantoj, kiuj interkrucas la brakojn kaj apogas la manojn sur la dorso de la apuduloj. Sur tiu solida bazo grimpas aliaj malpezaj ludantoj. La kasteloj povas havi sep, ok kaj kelkfoje naŭ etaĝojn.

Por ke la kastelon oni konsideru sukcesa, la knabeto, kiu supreniras al la pinto, devas levi la dekstran manon kaj poste malkonstrui la kastelon sen falado. Ĉiu grupo da ludantoj estas formita almenaŭ de 80 personoj. Ĝenerale estas viroj, sed partoprenas ankaŭ virinoj. Ĉiu teamo portas propran vestokoloron, kiu diferencas de aliaj teamoj. Povas esti ĉemizoj ruĝaj, verdaj, bluaj ktp.

Dum la starigo de la kasteloj oni ludas specialan muzikilon por vigligi la etoson. ■



8-etaĝa "homa turo"



9-etaĝa "homa kastelo"

Kampanoj profitas de sciencoj kaj teknikoj

EN Ĉinio 80% de la loĝantoj vivas en kamparo kaj la pokapa agro estas nur 0.09 hektaro, malpli ol 1/4 de tiu de la mondo. Tio estas la ĉefa problemo katenanta la kampan ekonomion en la longa tempo.

Kaj dum longa tempo la kampanoj faris solan terkulturadon, neglektante sciencojn kaj teknikojn, kio kaŭzis perturbon de la rilatoj inter agrokulturo, forstokulturo, brutobredado, flankokupado kaj fiŝkulturado. Multe da riĉfontoj ne estis utiligitaj. Pro tio multaj lokoj restis malriĉaj.

Ekde 1985 en la tuta Ĉinio ekpraktikiĝis la plano Ŝinghŭo — pere de sciencoj kaj teknikoj la kampanoj disvolvas agrikulturon, plialtigas administran nivelon de la vilaĝaj entreprenoj por akceli la kampan ekonomion kaj agri-

kulturan modernigon. En provado de apartaj projektoj, fondo de profitodonaj entreprenoj kaj sinteza ekspluatado de loka ekonomio oni plibonigas la planon. Praktikado de la plano multe faciligis popularigon de sciencoj kaj teknikoj kaj atingis evidentajn sukcesojn.

Ĝis la fino de 1993 laŭ la plano Ĉinio efektivigis 50 000 projektojn en pli ol 85% de la gubernioj de la tuta Ĉinio. Kaj por la plano Ĉinio investis 68.5 miliardojn da juanoj kaj sole en 1993-1994 akiris produktovaloron de 429.2 miliardoj da juanoj.

En la 10-jara praktikado de la plano Ŝinghŭo la ĉemara provinco Fujian en orienta Ĉinio akiris rimarkindajn sukcesojn. En la pasintaj 10 jaroj tie oni efektivigis pli ol 2 000 projektojn, kio ne nur kreis grandan valoron por la ŝtato sed ankaŭ profitigis la tieajn kampanojn.

nojn.


POR LA EKONOMIA DISVOLVIĜO

Fujian(Fuĝjan)-provinco estas abunda je montoj kaj riveroj, tamen malabunda je agroj. Utiligante la naturajn kondiĉojn tieaj loĝantoj bredas angilojn, salikokojn, pektenojn, haliotojn (*Haliotis*) kaj faras ilian prilaboradon. Ili ankaŭ plantas fruktoarbojn, kiaj longanarbo, liĉiujo, olivarbo kaj pampelmusujo. La sinteza tekniko pri manĝeblaj fungoj nun populariĝas en pli ol 40 gubernioj kaj distriktoj de la provinco. 6.6 mil hektaroj da bambuoj prosperas kaj la sinteza tekniko pri produktado de bambuaĵoj nun estas aplikata en 5 subprovincoj kaj urboj de Fujian.

La 4 elitaj industrioj surbaze de apliko de novaj sciencoj kaj teknikoj por ekspluati la tieajn naturajn riĉfontojn plirapidigis turnigon de la tradicia agrikulturo al la moderna. Dank' al la scienca kaj teknika progreso la kampara ekonomio multe disvolviĝis en la provinco.

Gushan-distrikto de Fuzhou, ĉefurbo de la provinco, estas unu el la lokoj, kiuj sukcese faris la konstruon de kompakta sciencoj kaj teknikoj laŭ la plano Ŝinghŭo. Ĝi efektivigis entute 14 projektojn grand-skalajn kaj alt-nivelajn. Tie la novaj teknikoj ludas grandan rolon en la produktado, atingoj de sciencoj kaj teknikoj variĝas kaj la tradiciaj industrioj estas anstataŭataj de la moderna. En 1994 la urbeto produktis varojn kun valoro de ĉirkaŭ 3 miliardoj da juanoj kaj la kampanoj enspezis po pli

Kultivejo de akvoproduktaĵoj



ol 3 000 juanojn, t.e. 28-oble kaj 3.4-oble pli multe ol tiuj en 1986. Dank' al tio Gushan fariĝis modelo en la vilaĝa konstruado kaj ekonomia disvolviĝo.

Dum praktikado de la plano Ŝinghŭo Fujian-anoj inventis multajn novajn varojn. Tio tre utilas al la ekonomia disvolviĝo. La ekspluato de manĝeblaj fungoj faris Fujian la unua provinco en produktado de manĝeblaj fungoj de nia lando. La tekniko pri altprodukta bredado de virseksaj tilapoj (*Tilapia mossambica*) moderigis la prezon de la tilapoj sur la merkato. Dank' al apliko de la sintezaj teknikoj pri bambu-kulturado la valoro de hektara bambuo 6-obliĝis, aperis grandnombraj bonhavaj vilaĝoj kaj urbetoj.

Efektivigo de la plano Ŝinghŭo ne nur alportis 4.4 miliardojn da juanoj al Fujian-provinco en la pasintaj 10 jaroj, sed ankaŭ pliproduktos varojn de 25 miliardoj da juanoj en la venontaj 5 jaroj por ĝi.

NOVAJ TEKNIKOJ EN KAMPARO

Sciencistoj kaj teknikistoj ludas gravan rolon en la kampara ekonomio dank' al siaj scioj. En Fujian-provinco aŭdiĝas multaj novaĵoj:

La angiloj, vivantaj en sensala akvo, havas siajn apartajn vivmediojn kaj migras aparte. Pro tio oni malfacile konas la kutimon de ilia generado. Kaj oni devas kapti la angilidojn en la naturaj riveroj kaj lagoj por poste ilin bredi. Guo Genhe, laboranto de la Agronomia Akademio de Fujian-provinco, sukcesis en esploro de la artefarita generado de angiloj laŭ la riĉfontoj, klimato kaj aliaj kondiĉoj de la orienta Fujian-provinco. En 1994 la 24 angilaj bredejoj prizorgataj de li akiris la valoron de 250 milionoj da juanoj.

La ekspluato de la tekniko pri kulturo de manĝeblaj fungoj, kiuj kreskas sur herboj, estas alia ekzemplo. Lin Zhanxi (Lin Ĝansji), altranga agronomo, inventis la koncernan teknikon avangardan

internacie. Kaj la tekniko kreis produktovaloron de unu miliardo da juanoj jare. Fakuloj diris, ke la invento havas gravan signifon por plene ekspluati riĉfontojn, pliprodukti grenon kaj protekti medion.

Ankaŭ la tekniko inventita de inĝeniero Lin Min'en pri bredado de virseksaj tilapoj estas ege valora. Li bredis la fiŝojn en 7-hektara cisterno, elpensis recepton kontraŭ fiŝaj malsanoj, kaj elkulturis novtipajn hibridajn tilapojn frostorezistajn kaj virusrezistajn surbaze de ŝanĝo de genoj. La produktokvanto de tilapoj breditaj de li 6-obliĝis en 1995.

En Fujian-provinco pli ol 30 000 sciencistoj kaj teknikistoj sin ofertas al la praktikado de la plano. Tio ludas gravan rolon por la rapida kreskado de la tiea kampara ekonomio.

KAMPARANOJ EN LERNADO DE SCIENCIOJ KAJ TEKNIKOJ

La plano alportis al Fujian-provinco grandan ŝanĝigon. La provinco elkulturis grandnombrajn kapablulojn en teknika esplorado kaj elstarajn administrantojn. Ili efike ŝanĝas la produktan metodon de la kampara ekonomio.

En Longyan-gubernio en la suda parto de Fujian-provinco pli ol duono de la laboruloj jam lernis teknikojn. Pli kaj pli multaj kamparanoj ekkomprenis la gravecon de sciencoj kaj teknikoj kaj scipovas serĉi elirejon en merkatoj, talentulojn en produkto kaj profiton



S-ro Lin Zhangxi

en administrado. Iuj eĉ elspezis milojn da juanoj por alilanda patentita tekniko.

La kamparanoj, kiuj respondacas pri planto de bambuoj sur monto laŭ kontrakto, aŭ iris aliloken por lernado, aŭ invitis fakulojn por solvi malfacilojn. Tio prosperigis bambuojn kaj multe profitigis ilin. Iu kamparano ekspluatis 5 hektarojn da tero kaj plantis prunarbidojn. Kvankam la prunarboj bone kreskis tamen ne fruktis. Post lernado en hortikultura kurso li sciis, ke en lia loko la klimato kaj aliaj kondiĉoj ne taŭgas por fruktiĝo de prunoj. Li do plantis mandarinarbidojn kaj persikarbidojn kaj akiris riĉan rikolton.

Multaj kamparanoj profitis de sciencoj kaj teknikoj en sia sperto. Tio entuziasmigis ilin en diligenta lernado de scioj.

La ŝtato decidis meti la graviton de la plano Ŝinghŭo en disvolvion de la ĉefaj industrioj de kamparanoj kaj konstruon strikte rilatan al la plano kaj la urbeto ekonomio kun la celo gvidi la kamparan ekonomion sur la vojon de scienc-teknika progreso kaj klerigo de la kamparanoj. ■

Ŝanĝiĝo de Qiaodang-vilaĝo

Tesкто kaj fotoj de HAN HONG



En la elementa lernejo de la vilaĝo



Valizo-fabriko investita de la vilaĝo kaj Hongkong


Sur ebenaĵo de Hubei-provinco ĉe Yangzi-rivero estas la vilaĝo Qiaodang, kiu estis ege malriĉa antaŭ dekelke da jaroj. La vilaĝanoj ne havis monon por konstrui eĉ plej simplan ponteton super rivereto kaj ili devis transiri la riveron en granda ligna pelvo. Sed nun la vilaĝo havas tute novan fizionomion. Ĉiuj familioj loĝas en novaj domoj, la vilaĝanoj ĝuas senpagan kuracon kaj la infanoj senpage vizitas lernejon aŭ infanvartejon.

Kiel la vilaĝo liberigis sin de malriĉeco? Antaŭ dekelke da jaroj vilaĝestro Li Xianjin (Li Ŝjanĝin) rimarkis la avantaĝan situon de la vilaĝo en minejo. Li do decidis konstrui pasloĝejon por migrantaj laboruloj, ŝoforoj kaj komercistoj. Per mono akumulita de la pasloĝejo la vilaĝo entreprenis manĝaĵo-prilaboradon, vestofaradon, laminatadon kaj fabrikadon de elektraj maŝinoj. Per enspezo de tiuj industrioj la vilaĝo kulturis legomojn kaj bredis fiŝojn. Krome, la vilaĝo ankaŭ investis 40 milionojn da juanoj por konstrui hospitalon helpe de la Hubei-a Kancerologia Hospitalo.

Nun la vilaĝanoj vivas novan vivon. Ili havas sian parkon, kie ili legas, promenas kaj aprecas ĝardenistikon kaj pentraĵon. Krome, la vilaĝo havas ankaŭ teknikan mezlernejon.



En la parko de la vilaĝo



En vestiblo de kamparana domo



En la vilaĝa-japana fabriko de elektraj maŝinoj

Sankta loko de la ĉinaj prapatroj

GENERALE oni diras, ke Huangdi kaj Yandi estas prapatroj de la ĉina nacio, neglektante Chiyou, kiu batalis kontraŭ Huangdi kaj post la malvenko estis mortigita kiel kaptito. Oni priskribas, ke Chiyou estis monstro, kiu havis homan korpon kun kupra kapo kaj fera frunto, parolis bestan lingvon kaj manĝis sablon kaj gruzon. Se oni estos liberigita de la antaŭjuĝo kaj juste traktos lin, oni do devos konfesi, ke Chiyou estis estro de potenca tribo en la prahistorio de Ĉinio. Kiel Huangdi kaj Yandi, ankaŭ li estis unu el la plej eminentaj personoj de Ĉinio siatempe. Ĝuste pro ilia asociigo, batalo kaj harmonio la ĉina socio progresis.

Post la malvenko de Chiyou, plejparto de liaj tribanoj aliĝis al la triboj gvidataj de Huangdi kaj la ceteraj transiris la Flavan Riveron kaj fikslogiĝis en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero, miksiginte kun la indiĝenoj. Nun la ĉinaj *mjaŭoj* kaj *jaŭoj* ankoraŭ rigardas lin sia prapatro.

Huangdi, Yandi kaj Chiyou, prapatroj de la ĉina nacio, iam kolektiĝis en Zhuolu en la nuna Hebej-provinco. La tri grandaj triboj estrataj de ili fariĝis tribo-unuigo, la plej frua en la ĉina historio. Tie ili faris grandskalan, intensan kaj longan batalon, la plej frue notitan en la ĉina historio. Ĝuste tie formiĝis la granda harmonio de diversaj triboj, kio markis la finiĝon de la barbara epoko kaj grandan socian progreson. Kaj Ĉinio eniris en la civilizitan socion.

Zhuolu situas okcidente de Pekino je 150 km. Tie de norde suden kuŝas ebenaĵoj, montetoj kaj montoj. Ĝi estas fama greno- kaj frukto-produktejo de Ĉinio. La skriba historio de Ĉinio komenciĝis per la batalo inter Huangdi kaj Chiyou, kiu okazis ĝuste en tiu loko. Historia libro notas: “Huangdi venkis en Zhuolu kaj kaptis Chiyou”, “Chiyou ribelis kontraŭ Huangdi, tiu ĉi do gvidis trupojn kaj faris batalon kontraŭ Chiyou en Zhuolu”, kaj “Huangdi batalis kontraŭ Yandi en Banquan (Banĉjŭan). Li trifoje gajnis la batalon kaj per tio realigis sian ambicion”.

De tiam forpasis kelkaj jarmiloj, tamen en Zhuolu ankoraŭ videblas ruinoj pri laboro, batalo kaj



Statuo de Huangdi en la ruino de Huangdi-urbo

konstruado fare de Huangdi, Yandi kaj Chiyou. Tie cirkulas multaj legendoj pri tiuj tri herooj. Ili estas atesto de la longa historio kaj brila kulturo de la ĉina nacio.

Norde de Sanbao-vilaĝo de la urbeto Fanshan en la sudorienta Zhuolu-gubernio estas ruino de Huangdi-urbo. La difektitaj urbomuroj estas de nerregula kvadrato. Hodiaŭ oni ankoraŭ povas vidi postsignojn de termaso kaj ramita tero. Interne de la urbo estas fruktoĝardeno, tamen neniu loĝas tie. La loko ankoraŭ ne estas prifosita. Ĉie videblas fragmentoj de ŝtonaj instrumentoj kaj ceramikaĵoj. Ili plejparte estis faritaj en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770 — 476 a.K.) kaj tiu de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Kaj tie estas ankaŭ tipaj neolitikaj objektoj.

Proksime de Huangdi-urbo estas aliaj historiaj restaĵoj, kiaj Huangdi-fonto, Chiyou-vilaĝo, Chiyou-fonto, Chiyou-tombo, Yandi-kampadejo kaj Yandi-fonto.

La historia libro notas, ke post la morto de Huangdi oni entombigis lin en Qiaoshan (Ĉjaŭŝan). Tamen en Ĉinio estas multaj lokoj nomataj Qiaoshan. Kie do estas la tombo de Huangdi? Tio estas nesolvita historia problemo. Tamen, laŭ la historiaj libroj verkita antaŭ la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) nur en Zhuolu estas Qiaoshan. Multaj fakuloj faris esploradon en Qiaoshan de Zhuolu. Tiu ĉi Qiaoshan troviĝas norde de Huangdi-urbo je 15 km. En ĝi estas Huangdi-templo, lia kultejo, varm-fonta palaco kaj aliaj restaĵoj. Krome, en ĝi estas ankaŭ antikvaj surrokaj pentraĵoj, ŝtonaj pistuoj kaj hakiloj kaj krudaj ceramikaĵoj el argilo kaj sablo. El ili la plej fruaj estas neolitikaj. Pluraj fakuloj opiniis, ke ĉio ĉi atestas, ke tie estas la sidejo de la tombo de Huangdi. Ili esperas, ke pli da fakuloj faros esploradon en Qiaoshan por kiel eble plej frue solvi tiun historian enigmon.

Tiuj kulturaj restaĵoj estas protektataj de koncerna departemento. Nun oni entreprenas ankaŭ turisman servon surbaze de tiuj historiaj objektoj por fari Zhuolu turisma loko plej proksima al Pekino kaj sankta loko por la posteuloj de Huangdi, Yandi kaj Chiyou. ■

En urbeto de pomoj

Teksto de HAO QINGSHAN kaj PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

EN aŭtuno, ĉie en la urbeto Zangjiazhuang estas pomoj: sur la arboj, apud la vojoj, sur la standoj... Ni staris antaŭ amaso da pomoj en fruktoĝardeno, kies mastrino estis metanta pomojn en kestojn. Vidinte nin, ŝi tuj elektis pomojn grandajn kaj invititis nin manĝi. “Estas Ruĝa Fuji (speco de pomo), tre dolĉa,” ŝi diris. La pomoj ja estis fragilaj, sukoriĉaj kaj dolĉaj kun ŝelo maldika. Nia admiro ĝojigis ŝin, ke ŝi donacis duonsakon da pomoj al ni. Estas moro de la urbeto de pomoj — kiam vi gastas ĉe lokanoj, vi devas gustumi ilian pomon. Poste vi rimarkos, ke la pomo estas vere bongusta. Certe la gastigantoj estos tre kontentaj pri via admiro. Ne gravas, ĉu vi aĉetos pomojn aŭ ne. Ŝajne ili sciigas vin, ke la pomoj de ilia urbeto estas la plej bonaj en Ĉinio.

Fakte oni ne rajtas titoli la siajn

En fruktoĝardeno



“la plej bonaj”. Ĉiujare la fruktokulturistoj portis siajn pomojn al Pekino aŭ la provinca ĉefurbo por partopreni juĝkunvenon kaj plurfoje gajnis la unuan lokon. Tiaj ĝojigaj novaĵoj skribitaj sur ruĝaj paperoj ofte aperis sur la muro de la urbodomo.

Tamen antaŭe ili vivis alian vivon. Oni diras, ke monto vivtenas loĝantojn ĉe monto, maro vivtenas loĝantojn ĉe maro. La urbeto Zangjiazhuang situas en Yantai-regiono de Shandong-duoninsulo, do la loĝantoj sur malfekunda grundo prenis sekajn batatojn kiel ĉefan manĝaĵon en multaj jaroj. En la dialekto de Shandong-anoj, seka batato signifas “malriĉo”. Ili ja estis malriĉaj — unu-taga enspezo egalas al prezo de skatolo da alumetoj.

Komence de la 80-aj jaroj, fakuloj pri fruktokulturo de la Ĉina Akademio de Sciencoj importis en


Ĉinion bonkvalitajn japanajn pomojn “Ruĝa Fuji” kaj prenis montetaron de Yantai kiel eksperimentan bazon. Jen ŝanco de loĝantoj de Zangjiazhuang...

“Mi plantis iomete da batatoj por gustumi,” diris maljunulo, kiu laboris en sia pom-ĝardeno. Tamen, kiam la pomoj malfrumaturaj ruĝiĝas, oni bezonas meti reflektan membranon sub arbojn, ŝiri iom da folioj, turni la pomojn, por ke ili ricevu sufiĉe da sunlumo kaj tute ruĝiĝu.

La urbetanoj lernis avangardajn teknikojn de televidaj programejoj, de teknikistoj kaj de eksterlandaj fakuloj, kiuj persone venis al la urbeto por prelegi. Ili tre ŝatas la germanan fakulon kun bluaj okuloj kaj la japanan fakulon kaj lian filon, kiuj tre similas al ĉinoj.

La fruktokulturistoj estas ĉiam okupitaj. Eĉ en vintro necesas sterki la arbojn. Pro la malglateco de la montvojo oni ne povas uzi traktoron. Por transporti sterkon, oni devas uzi ĉaretojn aŭ vektportoj. Virinoj laboras ne nur en kuirejo, sed ankaŭ en ĝardeno same kiel viroj. En okupiteco ili aĉetas manĝaĵojn kaj manĝas hejme; certe ne mankas trinkaĵo, ĉar viroj ŝatas bieron same kiel urbanoj. Ankaŭ maljunuloj partoprenis la laboron — ili protektas la arbojn de infekta malsano.

La honestaj montanoj ellernis komercon kaj ekhavis la koncepton pri konkurenco. Kiam en la ĉina merkato multiĝis “Ruĝa Fuji”, ili ekplantis fru-maturan



Kamparana infano



En kamparana korto

specon, kiu estas negranda tamen kun punca koloro kaj dolĉa gusto, specon kun dolĉ-acida gusto kaj acidan specon, kiu tre plaĉas al eŭropanoj.

Ili ankoraŭ estas ŝparemaj — ili ŝparas monon por konstrui grandan loĝdomon kun tegola tegmento. Tinkturisto kolektas uzitajn vestojn. “Post tinkturado oni povas daŭre porti tiujn vestojn,” diris maljunuloj. Junuloj portas modajn vestojn ne por laboro, sed por festo kaj rendevuo.

Geedziĝo estas grava afero. Maljunuloj konstruas domon por sia filo. Doto de novedzino ne plu estas novaj vestoj, sed luksaj mebloj kaj familiaj elektraj aparatoj. En la geedziĝa festo novgeedzoj kune mordas sur ŝnuro pendantan pomon, sur kiu troviĝas vorto “Duobla Feliĉo”. La vorto ne estas gluita sur la pomo, sed “kreskas” sur ĝi. Tiaj feliĉigaj pomoj aperas ankaŭ en vendejoj de Pekino. ■



Fruktoportaj branĉoj

Zangjiazhuang en rikolta sezono



Grandaj atingoj en batalo

ANTAŬ 2 jaroj nia gazeto jam publikigis tiuf flankan artikolon “Ĉinio kontraŭ koruptiĝo”, kiu konigis firman batalon de Ĉinio kontraŭ malversacio kaj koruptiĝo. Do, kial hodiaŭ ni ankoraŭ parolas pri ĝi? La kialo estas klara: se ŝtato aŭ partio volas ekzisti kaj disvolviĝi, ĝi devas senĉese batali kontraŭ koruptiĝo. Kaj en 1995 Ĉinio alprenis efikajn rimedojn kaj akiris multajn atingojn en la batalo kontraŭ koruptiĝo.

ANIMSKUAJ KAZOJ DE MALVERSACIO KAJ KORUPTIĜO

La koruptiĝo estas ege abomenata de popoloj, ĉar la koruptiĝintoj, utiligante sian potencon, ĉasas privatajn interesojn. Se potenctenantoj koruptiĝas, ili fariĝas pli danĝeraj ol feroĉa tigro. En 1995 en Ĉinio la batalo kontraŭ koruptiĝo havis okulfrapan karakterizaĵon, ke altranguloj, kiuj koruptiĝis, estis kondamnitaj unu post alia.

Komence de 1995 Yan Jianhong (Jan Ĝjanhong), la unua estis kondamnita. Ŝi estis altranga ŝtatoficistino en Guizhou-provinco kaj konata kiel “unua sinjorino” de la provinco. Ŝi laboris en la Komitato de Planizita Ekonomio de la provinco kaj tiu komitato rajtas sankcii disponadon de kapitalo kaj urĝe bezonatajn materialojn kun malalta prezo. Utiligante la rajton, ŝi kontraŭleĝe disponigis kapitalon kaj materialojn pere de sia filo al entreprenoj, al kiuj mankas kapitalo kaj materialoj, kaj ŝi ricevis rekompencon. En 3-4 jaroj ŝi unue, utiligante sian potencon, ĉasis monon kaj poste negocis per potenco kaj mono kaj ŝtel-alproprigis 5 milionojn da juanoj. De januaro ĝis julio de 1993 ŝi kvinfoje faris ŝtel-alproprigon de pli ol miliono da juanoj. Tiu sumo estas astronomia cifero por popoloj vivantaj en iuj malriĉaj regionoj de Guizhou-provinco. Oficistoj, kiuj traktis la kazon pri ŝia malversacio, diris, ke ŝi estis cent-pocenta sangosuĉanto.

La 16-an de januaro de 1995 Yan Jianhong estis kondamnita al morto. Kaj post ŝi multaj aliaj altrangaj ŝtatoficistoj estis eksigitaj pro sia kontraŭleĝa agado kaj enkarcerigitaj pro sia koruptiĝo.

La plej granda kaj miriga el tiuj kazoj okazis en Pekino. Vicurbestro Wang Baosen ŝtel-alproprigis

pli ol 400 mil juanojn kaj liveris seninteresan publikan monon de 300 milionoj da juanoj al siaj familianoj por ilia negocado kaj perdis al la ŝtato pli ol 100 milionojn da juanoj. Per publika mono li konstruigis luksajn vilaojn, aĉetis altklasajn pensionojn kaj tutjare luis ĉambrojn en luksaj hoteloj por plezurĝuo. Li ankaŭ faris kontraŭleĝan agadon kaj vivis diboĉan vivon. Post kiam lia koruptiĝo estis malkaŝita, li timis punon pro sia krimo kaj sin mortigis. Kiam oni traktis la kazon pri la malversacio kaj koruptiĝo de Wang Baosen, oni hazarde trovis, ke ankaŭ Chen Xitong (Ĉen Ŝjitong), sekretario de la Pekina Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, havis grandan respondecon pri la krimo de Wang Baosen, kaj krome li, utiligante sian potencon, kontraŭleĝe donis privilegion al siaj familianoj kaj parencoj por ilia komercado kaj funkciigo de entreprenoj, kiam li funkciis kiel urbestro de Pekino kaj sekretario de la Pekina Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Ankaŭ li koruptiĝis kaj vivis luksan kaj diboĉan vivon. La 29-an de septembro de 1995 pro sia kulpo Chen Xitong estis elpelita el la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj el ĝia Politika Buroo kaj senigita je sia reprezentanteco de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio.

Kaj la kazo pri lia koruptiĝo ankoraŭ estas traktata. El tiuj, kiuj estis eksigitaj pro koruptiĝo, Chen

En ekspozicio pri batalo kontraŭ koruptiĝo



kontraŭ koruptiĝo

Xitong estis la plej alta ŝtatoficisto post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949. Tio montras ne nur, ke koruptiĝo jam naskiĝis en la ĉina registaro, sed ankaŭ, ke la ĉina registaro havas firman decidon batali kontraŭ malversacio kaj koruptiĝo. Laŭ koncerna statistiko en la unuaj 8 monatoj de la pasinta jaro, 44 813 kazoj pri malversacio kaj koruptiĝo estis traktataj en la tuta lando kaj krimuloj estis kondamnitaj unu post alia.

ALIAJ TASKOJ EN 1995

Aranĝo de bankedo per publika mono por regali siajn gastojn kaj konkuro inter potenctenantoj pri luksaj aŭtoj estas la plej okulfrapaj el la koruptiĝoj kaj la plej abomenaj por la popolanoj. Kvankam la ĉina registaro multfoje publikigis dekretojn por malpermesi ilin, tamen ili ne estis forigitaj. Ĝuste pro tio la ĉina registaro difinis malpermeson de aranĝo de bankedo per publika mono kaj elstrekadon de tro luksaj aŭtoj de potenctenantoj kiel siajn taskojn en la batalo kontraŭ koruptiĝo en 1995.

Komence de 1995 la ĉina registaro klare montris, ke estas malpermesite ĉeesti bankedojn, kiuj malhelpas justan traktadon de kazoj pri koruptiĝo, kaj viziti balon, noktoklubon k.c. per publika mono. Responde al tio, la lokaj registaroj ellaboris konkretajn rimedojn laŭ siaj kondiĉoj por elradikigi korup-

tiĝon. Kaj poste la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio faris landskalan kontrolon tiuflanke. Dank' al tio aperis bona fenomeno tra la tuta Ĉinio. Antaŭ iu fama hotelo de Pekino, kie antaŭe oni parkis multajn luksajn aŭtojn, nun apenaŭ videblas tiaj aŭtoj, kaj oni malofte pagas al hoteloj per ĉeko. Samtempe al tiuj, kiuj ankoraŭ manĝas per publika mono, oni ne nur donis punon politike, sed ankaŭ ordonis pagi por manĝo. En la Urumqi-a Fervoja Buroo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono 106 personoj devigite pagis 19 700 juanojn por sia manĝo.

Ankaŭ estas sukcesa la elstrekado de tro luksaj aŭtoj de potenctenantoj. Ĝis la fino de 1995 en Ĉinio 8 577 tro luksaj aŭtoj estis elstrekataj, i.a. 456 de vicprovincestroj. En Shenzhen kaj Pekino oni aŭkciiis tiajn aŭtojn kaj donis al la ŝtato la monon akiritan kontraŭ la aŭtoj.

NOVAJ RIMEDOJ KONTRAŬ KORUPTIĜO

Nemalmultaj el la malversaciuloj degeneris ne denaske, multaj el ili estis ŝtatoficistoj eĉ meritoplenaj. Kial do ili poste fariĝis krimuloj de la popoloj? La kialo kuŝas ĉefe en tio, ke unufleksi ili kapitulacis sub la logo de mono kaj aliflanke la neperfektiĝo de koncernaj politikoj kaj leĝoj kaj la praktikado de la sistemo farita de la ŝtato pri du malsamaj prezoj por gravaj materialoj estis facile profiteblaj de malversaciuloj. Ĝuste pro tio la batalo kontraŭ koruptiĝo devas daŭri kaj tiufleksi reguloj kaj leĝoj devas esti starigitaj kaj perfektigitaj kaj samtempe oni devas doni edukadon al la ŝtatoficistoj.

Novembre de 1995, estis fondita la Ĝenerala Buroo kontraŭ Malversacio kaj Koruptiĝo sub la Plej Alta Prokurorojo de la Ĉina Popola Respubliko. Tio montras, ke la tiufleksi batalo de Ĉinio jam iras la vojon specialan kaj regulan. Antaŭ tio 26 el la provinclivaj prokurorojoj de Ĉinio fondis kontraŭmalversacian buroon kaj jam akiris rimarkindajn atingojn tiufleksi. Kaj plie, nemalmultaj el la lokaj registaroj de Ĉinio fondis institucion, por ke oni denuncu malversacion al polico. Ĝuste dank' al tio multaj malversaciuloj estis malkaŝitaj. ■

Rigardo de subaĉetaĵoj





Grandaĝulo de la vilaĝo en prezidado de la ceremonio

Edzigo jaŭ-

Teksto de HAN HONG
Fotoj de CHEN CHANGLIN



Familiano de la novedzino ŝanĝas vestojn por la novedzo.



Amikoj kaj parencoj de la novgeedzoj en la ceremonio


Laŭ kutimo de han-oj edzino devas loĝi en la hejmo de la edzo. Sed laŭ kutimo de jaŭ-oj estas tute libere por la novgeedzoj, ĉu loĝi en la edza hejmo, ĉu en la edzina hejmo. Kaj nun ankorau furoras la kutimo edzigi junulon en la edzina hejmo.

En la edziĝa tago venas multaj amikoj por adiaŭi la novedzon. Kiam la novedzo kaj liaj akompanantoj atingas la vilaĝon de la novedzino, ili ne devas tuj eniri ĝin, sed pacience atendi ekster la vilaĝo. La akompanantoj de la novedzino venas kun novaj vestoj por la novedzo. Sub sunombrelo ili ŝanĝas vestojn por la novedzo kaj kovras lian kapon per kvadrata tuko, ke oni povas vidi nur lian vizaĝon.

En gaja popola muziko la akompanantoj de la novedzo kaj novedzino kune kondukas la novedzon ĝis la pordo de la novedzina domo. Tiam la novedzo devas lavi la piedojn kaj surporti novajn ŝtrumpojn kaj ŝuojn, tiel ke li tute "noviĝis" de la kapo ĝis la piedoj.

Kiam la novedzo enpaŝas en la domon, la novedzino en belaj vestoj kaj brodita ĉapelo eliras el sia ĉambro, akompanate de siaj kamaradinoj. La ceremonio estas prezidata de grandaĝulo de la vilaĝo. Post riverenco al la ĉielo, la tero kaj la prapatroj, la novgeedzoj recipokas pokalon da vino. Post la ceremonio la gratulantoj eniras la domon kaj en muziko komenciĝas festeno. La festeno daŭras ĝis la vespero. Post la festeno la novgeedzoj riverencas unu al la alia kaj en gajeco eniras en sian ĉambron, kio markas la finiĝon de la nupto.

de nacio



Novedzo eskortata al la hejmo de la
novedzino

Akompanantoj survoje



EL ĈINAJ GAZETOJ

PLUA LARĜIGO DE PORDOMALFERMO EN OKCIDENTA ĈINIO

En la venontaj 15 jaroj Ĉinio plue larĝigos la pordomalfermon en sia okcidenta parto. La regiono kun evidenta supereco de riĉfontoj okupas gravan strategian pozicion en disvolviĝo de la nacia ekonomio de Ĉinio. Ĝi havas nombron da teknikistoj kaj sciencistoj kaj certan bazon de industria prilaboro. Post fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la ĉina registaro investis por gravaj industriaj entreprenoj, kiuj fariĝis famaj industriaj bazoj de Ĉinio. En la ekonomia disvolviĝo, reformado kaj pordomalfermo la regiono siaflanke havas apartajn superecojn: Unue, la starto por larĝigi pordomalfermon povas esti farita sur pli alta bazo kaj, due, la ekonomia disvolviĝo de la sudorientaj ĉemaraj regionoj en la pasintaj dekelkaj jaroj donis spertojn kaj pli fortan subtenon al la disvolviĝo de okcidenta Ĉinio. Nun koncernaj departementoj de la ŝtato preparas sin por ellabori la politikojn akceli la pordomalfermon en centra kaj okcidenta Ĉinio.

NOMADISMO DE XINJIANG-AJ PAŜTISTOJ FINOTA

En Xinjiang (Ŝingĵang) ĉiujare pliaj 8 000 paŝtistaj familioj de kazahoj fiksloĝiĝas kaj komencas sian vivon de kamparano-paŝtisto. Tiele, la kazahoj en Xinjiang en 1999 finos sian nomadisman vivon, kiu daŭris milojn da jaroj.

La fiksloĝiĝo de paŝtistoj estas ŝanĝiĝo kun historia signifo. Plejparto de la paŝtistoj en Xinjiang vivas norde de Tianshan-montaro. Por elturni ilin el la tradicia nomadismo la registaro de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono plenenergie faras loĝdoman kaj stepan konstruadon kun fiksloĝiĝo de paŝtistoj kiel la celo kaj kombinas laboradon kaj agrikulturan ekspluatadon kun konstruado de katastrofo-rezista gubernio kaj ekspluato de tipa paŝtejo. Nun ĉ. miliono da paŝtistoj fiksloĝiĝis.

ORFOJ EN ĈINIO

Ĉinio havas 43 681 sociajn azilojn. En la urboj estas 2 082 ŝtataj sociaj aziloj, el kiuj estas 73 orfojoj, kie vivas 20 000 orfojoj. Ĉinio havas sume 4 SOS-vilaĝojn por infanoj, kie vivas 370 infanoj. En diversaj lokoj de Ĉinio funkcias ĉ. 10 000 konvaleskejoj, kursoj por mensdebilaj infanoj, vivtenejoj de handikapitaj infanoj kaj sanigejoj kaj centoj da sociaj filantropiaj institucioj starigitaj de individuoj kaj kolektivoj. En la lando jam aperis reto de infana flegado partoprenata de la tuta socio, kun socia azilo kiel la kerno kaj disvitenado kiel la bazo. La monrimedoj de la supradiritaj establaĵoj de Ĉinio venas ĉefe de la ŝtato kaj kolektivoj. En 1993 la departementoj de civilaj aferoj de Ĉinio komencis efektiviĝi la planon helpi orfojn.

Dank' al tio, la rajtoj de la ĉinaj orfojoj estas leĝe protektataj.

TURISMAJ MEMORAĴOJ POR ĈINAJ URBOJ

Por Luoyang: trikolora fajencaĵo kaj palaca lanterno

Por Wuxi (Uŝji): silkaĵo, purpura ceramikaĵo kaj argilmodlaĵo

Por Changchun: skulptita jadaĵo kaj pentraĵo el plumoj

Por Kunming: bronzaĵo kaj brodaĵo

Por Chengdu: arĝentaĵo, ceramikaĵo kaj brodaĵo

Por Changsha: porcelanaĵo, kaloarea (*Calcareous clay slate*) skulptaĵo kaj brodaĵo

Por Guilin: bambua metiartaĵo kaj vimenaĵo

Por Lanzhou: nokteluma pokalo kaj teksaĵo el kamela lano

Por Xi'an (Ŝji'an): kopiaĵo de stelea surskribo kaj paŭsaĵo

Por Hangzhou: santala ventumilo, lignaĵo kaj silka ombrelo

Por Tianjin (Tjanĝin): tapiŝo, argilmodlaĵo kaj kajto

Por Nankino: brokato, teservico, vejna rulŝtoneto kaj platigita anaso

Por Chongqing (Ĉongĉing): metiartaĵo el bambuo kaj liano, ledaĵo, ŝtonskulptaĵo kaj ĉin-medicina medikamento

Por Ŝanhajo: silka teksaĵo, teservico, gemo, brodaĵo, tapiŝo kaj ĉin-medicina medikamento

Por Suzhou: duflanka brodaĵo, faksimilo, santala ventumilo, oraĵo kaj arĝentaĵo

Por Pekino: smeraldo, klozoneo, kaligrafiaĵo, pentraĵo, antikvaĵo, ledaĵo, metala kaj ŝtona stampiloj kaj eburaj

NATURPAPKO DE ĈINIO, MONGOLIO KAJ RUSIO

En la naturparko Daouri ĉe la landlimo inter Ĉinio, Mongolio kaj Rusio vivas 496 specoj da sovaĝaj bestoj. Tie migras libere nigraj gruoj, mevoj, cignoj, ruĝaj lupoj kaj aliaj, sume pli ol 20 specoj de raraj bestoj.

La naturparko troviĝas inter Hulun Boir de Ĉinio, Dornod de Mongolio kaj sudorienta Siberio de Rusio. Ĝi estis starigita marte de 1994, surbaze de la interkonsento atingita de la tri landoj. En la regiono la flaŭro kaj faŭno estas tre abundaj. Dank' al la komuna penado de la landoj, fondiĝis administracio de la naturparko kun areo de 9 518 kvadrataj kilometroj. Trilandaj fakuloj plurfoje faris esploradon en la naturparko.

Gvardio sur la Silka Vojo

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de DA WEI

PAROLANTE pri Xi'an (Ŝji'an), la komenco de la Silka Vojo, ni ne povas forgesi la Unuan Imperiestron de Qin-dinastio kaj la terakotajn militistojn kaj ĉevalojn de lia maŭzoleo. Ĉi tie ni nomas ilin gvardio sur la vojo ja kun iom da arbitreco, ĉar ili aperis multe pli frue ol la malfermiĝo de la Silka Vojo, kaj mia titolo estas nur alegoria.

Fakte, en la longa tempo post sia malfermiĝo la Silka Vojo plurfoje detruigis pro naciaj militoj kaj aliaj kaŭzoj. Por refunkciigi la vojon kaj defendi la sekurecon de la ĉinaj kaj alilandaj komercistoj kontribuis multaj militistoj en la historio. Ili estis gvardianoj de la vojo en la vera senco de la vorto. La plej fama el ili estis Ban Chao (32-102) de la Orienta Handinastio kaj la de li gvidata taĉmento.

Kiajn rilatojn la terakotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo havis kun la Silka Vojo efektive? La terakotaj militistoj kaj ĉevaloj estas la arkeologia eltrovo plej fama sur la Silka Vojo. Ĝuste pro tio, ke ili aperis pli frue ol la malfermiĝo de la Silka Vojo, ili do povis rigardi la ŝanĝiĝojn de la vojo kaj gardi ĝin en la alia mondo. Tiusence oni povas nomi ilin gvardio de la Silka Vojo.

LA MONDSKUA ARKEOLOGIA ELTROVO

En la ĉina historio Ying Zheng, t.e. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, estis ambicia suvereno. Li surtroniĝis en la aĝo de 13 jaroj. En 10 jaroj li konkeris la aliajn 6 regnojn, unuigis Ĉinion kaj fondis la unuan centralizisman feŭdan dinastion Qin (221-206 a.K.) en la ĉina historio.


Nelonge post sia surtroniĝo, Ying Zheng komencis konstrui por si mem maŭzoleon ĉe la piedo de Lishan-monto, oriente de la nuna Xi'an. 720 000 homoj partoprenis la konstruadon, kiu daŭris 37 jarojn. Historiaj libroj notas, ke sur la maŭzoleo estis haloj, dormo-




haloj, turoj, pordegoj kaj muroj internaj kaj eksteraj. Ili estis ekstreme luksaj. Subtere estis ne nur palacoj kaj sidlokoj de la korteganoj, sed ankaŭ multaj trezoroj. Tie estis riveroj kaj lagoj el hidrargo. La maŭzoleo estis ekipita per multaj kaŝitaj sagpafiloj kontraŭ ŝtelistoj.

Kaŭze de militaj tumultoj, natura erozio kaj homa detruado, jam antaŭ longe malaperis la surteraj konstruaĵoj de la maŭzoleo. Kaj la tombo, origine kun alto de 115 m kaj perimetro de 2 000 m, nun altas 76 m kaj ĝia perimetro estas 1 250 m.


Oni diris, ke antaŭe, kiam kamparanoj tie fosis puton aŭ konstruis tombon, ili ofte vidis "mon-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





Kupra čevalkapo



La kavo n-ro 1

La kupraj ĉaro kaj ĉevaloj



stron", kiu kaŭzis aŭ subitan disfalon de la tombo aŭ subitan elĉerpigon de la putakvo. Foje la "monstro" eĉ staris sur la putmuro, kun larĝe malfermitaj okuloj kvazaŭ rigardantaj la ŝvitantajn laborantojn. Marte de 1973, kiam Yang Zhifa, kamparano de Xiyang- (Ŝjijang)-vilaĝo, Lintong-gubernio, kaj aliaj 5 personoj fosis puton je 1 500 m for de la maŭzoleo, ankaŭ ili vidis la "monstron". Surbaze de tio, ĉinaj arkeologoj malkovris grandan nombron da terakotaj militistoj kaj ĉevaloj subtere de la maŭzoleo. La malkovro elektris la mondon. Vizitinte ilin, s-ro Chirac, ĉefministro de Francio, diris, ke tio estas la 8-a miraklo de la mondo.

GRANDIOZA SUBTERA LEGIO

La terakotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo troviĝas en 3 kavoj. La kavo n-ro 1 estas jam prifosita kaj oni nun prifosas la kavon n-ro 2. Mi venis en la eksponejon kaj suriris la observejon de la kavo n-ro 1. Estis mirinde, ke la vizitantoj, gajaj en la vestiblo, subite fariĝis seriozaj sur ĝi. En la loko je 5 m profunda sub la tersurfaco imponas la majesta formacio: La avano konsistas el 3 horizontaj linioj, po 68 militistoj por ĉiu linio, kun pafarko en la mano kaj sagujo sur la dorso. Tuj post ili estas infanterianoj, 6 militaj ĉaroj kaj 38 kolonoj.

Tio estas grandskala kaj bone aranĝita formacio el avano, ariero, ĉefa taĉmento, aloj, infanterio kaj ĉaroj. La militistoj ĉiuj marŝas kun la vizaĝo al la oriento. La militistoj kaj ĉevaloj estis faritaj laŭ la formo kaj grandeco de veraj homo kaj ĉevalo. Ili portas kun si verajn armilojn. Ĉio ĉi faras la halon kun 16 000 kvadrataj metroj impona kaj prezentas la militan potencon de Qin-dinastio.

Mi atente observis la formacion per binoklo kaj vidis, ke ĉiuj militistoj estas fortikaj, versimilaj, viglaj kaj faritaj strikte laŭ proporcio de la homkorpa strukturo. Ili ha-

vas diversajn mienojn. Iuj fikse rigardas antaŭen, aliaj meditas kun la kapo klinita. Ĉu en militista robo, ĉu en kiraso, ili estas similaj al veraj homoj. Videblas eĉ iliaj lipharoj, laĉoj kaj steboj.

S-ro Yuan Zhongyi, direktoro de la Muzeo de la Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj de Qin-dinastio kaj gvidanto de la arkeologia trupo, diris al mi, ke post esploro oni konstatis, ke la terakota legio nombras entute pli ol 7 000 militistojn kaj ĉevalojn kun ĉ. 100 ĉaroj, sed ĝis nun oni elterigis nur ĉ. 1 400. Oni elterigis ankaŭ grandnombrajn armilojn, inkl. de 2 spadoj, kiuj ankoraŭ brilas kaj tre akras post pli ol 2 000 jaroj subtere.

DELIKATAJ KUPRAJ ĈAROJ KAJ ĈEVALOJ

Aŭguste de 1978, sperta arkeologo Cheng Xuehua (Ĉeng Ŝjuehŭa), gvidante taĉmenton, faris prifosadon ambaŭflanke de la tombo. Taĉmentano Yang Xude (Jang Ŝjude) prifosis la teron per tradicia borilo Luoyang-ŝpato. Li enigis la ŝpaton je 7 m sub la teron kaj tiam li ne povis eligi ĝin. Li do ligis ŝnuron al sia talio kaj forte eltiris la ŝpaton. Li vidis metalan brilaĵon en grandeco de dikfingro eligitan kune kun tero sur la ŝpato. S-ro Cheng Xuehua pririgardis ĝin kaj konstatis, ke tio estas oraĵo simila al ornamaĵo sur ĉevala kapo.

Post tio ili faris daŭran prifosadon kaj fine konstatis, ke la loko estas inter la maŭzoleo kaj interna urbomuro. Tie estas kaŝitaj 6 kupraj ĉaroj kaj ĉevaloj ornamitaj per oro kaj arĝento. Oni opiniis, ke tie estas stalo de la subtera imperiestra palaco. Nun oni jam elterigis 2 el la 6 ĉaroj.

En la suda eksponejo mi vidis la kuprajn ĉarojn kaj ĉevalojn, duone grandajn kiel la veraj. Unu el ili estas restituita kaj la alia reproduktita. Jen antaŭ ni aperis 4 fortikaj blankaj ĉevaloj kun orbrilaj jungaĵoj. Sur la interna kaj ekstera flankoj de la ĉaroj estas ko-

lore desegnitaj drakoj kaj feniksoj dancantaj en nuboj. La ovalaj tegmentoj de la ĉaroj estas konveksaj kaj aludas la firmamenton. Sur la unua ĉaro staras veturigisto kun longa spado ĉe la talio kaj sur la dua genue sidas veturigisto rigardanta antaŭen kun rimeno en la mano. La ĉaroj kaj ĉevaloj sur la blanka fono estas farbitaj verde, blue, purpure, nigre kaj ruĝe kaj ornamitaj per oraĵoj kaj arĝentaĵoj.


Rigardante la kuprajn ĉarojn kaj ĉevalojn, mi nature rememoris aliajn koncernatajn vizitindaĵojn. Mi informiĝis, ke en la antikva urbo Xianyang (Ŝjanjang), proksime de Xi'an, oni elterigis kunentombigitajn argilajn rajdistojn kaj ĉevalojn, faritajn antaŭ la unuigo de Ĉinio far Qin-regno kaj pli antikvajn ol la terakota legio. Ĉinaj arkeologoj konstatis, ke ili estas la plej antikvaj argilaj rajdistoj kaj ĉevaloj trovitaj ĝis nun en Ĉinio. Kvankam ne delikataj nek imponaj, kiel la terakota legio, tamen ili estas tre valoraj por esplori la terakotan legion. Historiaj libroj notas, ke Qin-regno donis grandan atenton al bredado de ĉevaloj. En la lasta periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) la regno havis pli ol milionon da militistoj, mil militajn ĉarojn kaj dekmil ĉevalojn. La malkovro de la argilaj rajdistoj kaj ĉevaloj ja atestis tion. Iuj fakuloj opiniis, ke laŭ la formo iuj el la elterigitaj rajdistoj similas al fremduloj. Tio signifas, ke inter la rajdistaj trupoj de Qin-regno jam troviĝis membroj de alia nacio. Se tio estas vera, do la malkovro havas gravan signifon ne nur por studi la originon de la terakota legio kaj ĉinan skulpturan historion, sed ankaŭ por studi la armeajn specojn kaj nacian kunfandiĝon.

Preskaŭ samtempe kun la malkovro de la argilaj rajdistoj kaj ĉevaloj, en la kavo n-ro 2 de la terakota legio de Qin-dinastio estis elterigita kaleŝo tirata de 4 ĉevaloj. S-ro Yuan Zhongyi diris al mi, ke ĝenerale en ĉiu ĉaro estis 3 militis-




Terakotaj generaloj

Foto de LIU CHENGHANG



La eksponejo de la kavo n-ro 2



Prifosado en la kavo n-ro 2
Foto de WANG YICHUAN


toj, sed en tiu kaleŝo estis 4 militistoj. Laŭ kostumo la 4-a evidente estis oficiro. Laŭ pozicio la kaleŝo ne estis ordinara veturilo, sed komanda. La malkovro de la kaleŝo donis al ni valoran materialon por plua studado pri la historio de militado en la antikva Ĉinio.

MIRINDA PRIFOSEJO

Elirinte el la halo de la kavo n-ro 1, mi transpasis vakan kampon kaj vidis grandiozan grizan konstruaĵon, prifosejon de la kavo n-ro 2.

La ŝtuparo de la eksponejo estas alta kaj larĝa. La tegmento de la

Terakotaj ĉevaloj



halo konsistas el A-formaj ŝtalaj framoj. Samkiel tiu de la kavo n-ro 1, ĝi havas observejon, pli vastan ol tiu de la antaŭa. Tie ne estas montrataj elterigitaj objektoj, sed prezentiĝas vasta prifosejo. Kiom da militistoj kaj ĉevaloj ankoraŭ kaŝiĝas sub la tegmento? Kiaj do ili estas? Kia diferenco estas inter ili kaj la formacio de la kavo n-ro 1? La enigmoj faris la prifosejon pli mistera por la vizitantoj.

Oni trovis la kavon n-ro 2 en 1976, sed ĝia prifosado komenciĝis marte de 1994. Ĝia surfaca tero estis jam forigita. Iu laboranto diris al mi, ke la arkeologia trupo forportis entute dekmil kubmetrojn da tero de la prifosejo 6 000-kvadrat-metra kaj trovis trabotegmentitan ruinon de pli ol 1 000 kvadrataj metroj kaj elterigis 70 argilajn ĉevalojn kaj rajdisojn, pafantajn starante aŭ surgenue. Oni decidis prifosi la lokon ĝis la fundo de la kavo kaj restigi plejparton de la trabotegmentita ruino por esplorado kaj rigardado.

En la prifosejo mi vidis, ke laborantoj portas teron eksteren kaj arkeologoj brosas argilajn figurojn. Multaj el ili serioze difektiĝis, tial la arkeologoj devas fari riparadon. La riparado ja ne estas facila. Oni diris al mi, ke la kuprajn ĉaron kaj ĉevalojn konsistigas 3 000 pecoj entute, sed ĉe ilia elteriĝo oni trovis entute pli ol 1 000 disrompitajn pecojn, kaj plie, ili deformiĝis en 480 lokoj. La kupraj ĉaro kaj ĉevaloj estas remuntitaj de teknikistoj.

Multaj argilaj figuroj estas nekompletaj. La eksponataj militistoj en la kavo n-ro 1 plejparte estas glue remuntitaj el dekoj kaj ĉe cento da pecoj. Oni povas diri, ke la ĉinaj arkeologoj estas altnivelaj en riparado. Kompreneble, ili havas teknikajn mankojn en protektado de historiaj objektoj. S-ro Yuan Zhongyi kun bedaŭro diris al mi, ke ĉe la elteriĝo la argilaj figuroj estis belkoloraj, tamen iom poste ili perdis sian brilan koloron.

BAN CHAO — BRAVA PROTEKTANTO DE LA SILKA VOJO

Se oni insistus, ke sur la Silka Vojo estas gvardio, do ĝia estro estus Ban Chao en la Orienta Han-dinastio.

Kiam mi vizitis la templon Famen en Fufeng-gubernio, mi deziris viziti la naskolokon de Ban Chao, sed tempo ne permesis kaj mia deziro ne realiĝis. Laboranto de la muzeo diris al mi, ke jam en sia infaneco Ban Chao estis ambicia kaj oratora. Pro malriĉeco kiel dungito li devis kopii dokumentojn por ŝtata oficejo por vivteni sin kaj sian patrinon. Tio tamen ne katenis lian ambicion. Foje, li ĵetis la penikon teren kaj diris kun suspiro: “Mi, viro, devas lerni de Zhang Qian kaj fari meritojn por la lando.” Li do decideme aliĝis al la armeo.

Tiam la ĥunoj, unu el la naci-malplimulto de norda Ĉinio, invadis Okcidenton kaj la Silka Vojo, malfermita de Zhang Qian, estis detruita. La kortego de la Orienta Han-dinastio decidis remalfermi la vojon. Tiu historia misio falis sur la ŝultrojn de Ban Chao.

En la jaro 73 p.K., laŭ la ordono de la kortego Ban Chao, komandante 36 subulojn, iris al Okcidento. Ili unue atingis la regionon Shanshan ĉe la suda linio de la Silka Vojo. La regno estis nepre trairata loko por atingi Pamiron tra Tarim sur la Silka Vojo. Ĝi estis strategie grava loko por superregi Okcidenton kaj en multaj jaroj Han-dinastio kaj ĥunoj militis por okupi la lokon. Komence la reĝo de Shanshan montris grandan gastamon al Ban Chao kaj liaj subuloj, sed poste lia sinteno ŝanĝiĝis. Ban Chao tuj konsciis, ke tion kaŭzis timigo fare de la senditoj de la ĥunoj. Li do decidis mortigi la ĉefon de la senditoj, kiu gvidis trupon dekkelkoble pli grandan ol tiu de Ban Chao. La venko de Ban Chao nuligis la skrupulon de la loka regantaro kaj sekve de tio la

regnoj Shanshan, Yutian kaj Shule forpelis la ĥunajn oficistojn kaj denove starigis amikajn rilatojn kun la Orienta Han-imperio.

2 jarojn poste, ĥunoj denove direktis lancopinton al tiuj regnoj. Senhelpa, Ban Chao dronis en danĝera pozicio. La kortego de Han-imperio permesis al li reveni al la ĉefurbo Luoyang, tamen la tieaj popolanoj ne lasis lin foriri. En Yutian oni, tirante la ĉevalon de Ban Chao, diris kun larmoj: “Vi, la sendito de Han-imperio, estas intima al ni, samkiel niaj gepatroj, kaj vi neniel devas forlasi nin.” La sincereco de la popolanoj kortuŝis Ban Chao, li do svingis vipon en la aero kaj decidis resti tie.

Ban Chao ekfunkciis kiel sendito de la kortego en la aĝo de 40 jaroj kaj revenis al la kortego en la aĝo de 70 jaroj. Dum la 30 jaroj li funkciis kiel diplomato de Han-imperio en la okcidentaj regnoj, venkis sennombrajn malfacilojn kaj faris gravajn kontribuojn por la sekureco de la Silka Vojo kaj interŝanĝo de ekonomio kaj kulturo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Ĝuste pro tio oni memoras lin eĉ post jarmiloj.

TURISMA LOKO EN OKCIDENTA ĈINIO

Xi'an famas pro la terakota legio de Qin-dinastio kaj ĉiujare al-tiras al si multajn turistojn.

Ĝi estis la ĉefurbo de 11 dinastioj. Krom la terakota legio, tie troviĝas ankaŭ multaj aliaj historiaj objektoj. La malkovro de la terakota legio faris sensacion en la mondo kaj fariĝis granda movforto por akceli la turisman aferon de la urbo. En 1986 Xi'an estis honorita kiel unu el la 4 famaj turismaj lokoj de Ĉinio. Nun tie servas altklasaj hoteloj, kiuj povas akcepti 1.2 milionojn da turistoj ĉiujare. La disvolviĝo de la turisma afero starigis novan “silkan vojon” — vojon de amikeco inter Ĉinio kaj aliaj landoj. ■

Idiomoj en la ĉina lingvo

de ZHANG QICHENG

LA idiomo, kiel specifa lingva strukturo, troviĝas preskaŭ en ĉiuj lingvoj. En la okcidentaj lingvoj sin trovas multaj idiomoj devenantaj el la helena mitologio. Eĉ en la artefarita lingvo Esperanto estas esprimoj “kabei” kaj “krokodili”, kiuj ludas la rolon de idiomoj.

Do la formado kaj aplikado de idiomoj ja estas tre ordinara lingva fenomeno, kaj verŝajne la fakto, ke en la ĉina lingvo estas idiomoj, ne estas mirinda afero nek traktinda en speciala artikolo. Sed, ni devas klarigi, ke kompare kun la idiomoj en aliaj lingvoj, la ĉinaj idiomoj ja havas siajn notindajn trajtojn. Unue, ilia nombro estas granda, en iu plena vortaro de ĉinaj idiomoj estas kolektitaj entute pli ol tridek mil idiomoj. Tio estas nekomparebla por aliaj lingvoj. Due, ilia enhavo estas tre ampleksa kaj riĉa. Ĉinio havas longan historion kaj antikvan kulturon, kaj ĝuste sur tia historia fono kaj el tia kultura grundo kreskis la ĉinaj idiomoj. Ili estas vere diverskoloraj kaj riĉsencaj. Trie, ili estas faritaj el tre konciza lingvaĵo kaj enhavas profundan signifon. Sekve, ili jam fariĝis konsistiga parto de la ĉina lingvo kaj aplikigas en la ĉiutaga vivo de la popolo. Estas fakte, ke la ĉinoj ŝatas apliki idiomojn en verkado aŭ parolado, ĉar apliki idiomojn estas tre oportune pro ilia preteco, kaj per idiomoj oni esprimas sian ideon tre trafe kaj vigle, kaj la ideo esprimita povas esti pli facile kaj ĝuste komprenata.

Pli ol 90% de la ĉinaj idiomoj konsistas el kvar ideogramoj, ĉar la plej fruaj idiomoj devenis el la antikva poemaro “Shi Jing (Ŝi Ĝing)” kaj la poemoj en tiu poemaro estis ĉiuj faritaj el frazoj de kvar ideogramoj; krome, por la ĉinlingvanoj, kvarsilabaj frazoj estas tre flue legeblaj aŭ paroleblaj. Ankaŭ troviĝas idiomoj el du, tri aŭ pli ol kvar ideogramoj, tamen, ili estas malmultaj.

El la duideogramaj idiomoj, la plej ofte uzata estas la idiomo *maodun*. *Mao* estas lanco kaj *dun* — ŝildo. Tiu idiomo formiĝis el antikva fablo: “Estis homo, kiu vendis lancojn kaj ŝildojn samtempe. Li unue fanfarone laŭdis sian ŝildon, ke ĝi estas plej fortika kaj netrapikebla por ajna armilo. Poste li laŭdis sian lancon, ke ĝi estas plej akra kaj eblas trapiki ajnan objekton. Iu apudstaranto do lin de-

mandis: “Se oni pikus vian ŝildon per via lanco, kio okazos?” La vendisto nenion povis respondi.” La vortoj lanco (*mao*) kaj ŝildo (*dun*) el tiu fablo estis poste kunmetitaj kaj fariĝis idiomo por esprimi la sencon de kontraŭdiro. Tiu idiomo estas tiel ofte aplikita en la ĉina lingvo, ke ĝi jam fariĝis ordinara vorto en la ĉiutaga vivo, eĉ multaj ĉinoj ne plu konscias, ke ĝi fakte estas idiomo kreita el antikva fablo.

Ĉinio posedas mirinde ampleksan stokon da antikva literaturo. El ĝi sin trovas klasikaĵo, poezio, disertaĵo, eseo, novelo kaj alispeca beletraĵo. Tiuj grandkvantaj verkaĵoj provizis la ĉinan lingvon per belaj idiomoj.

La supre menciita “Shi Jing” estas la plej antikva kolekto de poemoj kaj kantoj kompilita en la periodo de “Printempo kaj Aŭtuno”¹ (770-476 a.K.). Idiomoj ĉerpitaj el tiu poemaro entute nombras pli ol kvindek. Unu el la plej multe uzataj estas la jena: “Ŝnuru firme la fenestrojn kaj pordojn antaŭ ol pluvi”. Oni uzas ĝin por esprimi la ideon, ke oni faru preparon antaŭ ol io eventuale okazos.

Iuj idiomoj devenas el la paroloj de la granda pensulo Konfuceo (551-479 a.K.). Li estis respektata kiel sanktulo de la ĉina popolo kaj lia “Analekto” estis klasikaĵo nepre legata de ĉinaj kleruloj de generacio al generacio. Liaj diroj estis ofte cititaj



kiel aforismoj kaj sekve fariĝis idiomoj. Ekz., la idiomo “kion vi mem ne volas, ne trudu al aliaj homoj” estis el la buŝo de tiu granda pensulo. Tiu diro, kiu plene montris lian homamon, estas vere instrua. Kaj tiaj aforisme sencaj idiomoj abundas en la ĉina lingvo. Ekz., ni havas la idiomon: “Bona medikamento maldolĉa por la lango, sed saniga por la sango; sincera admono malplaĉa al la oreloj, sed utila al konduto.”

Alia antikva granda pensulo Mengzi (372-289 a.K.), adepto de Konfuceo, tre lertis en elokventa argumentado kaj ĉiam emfazis sian argumenton per sagacaj metaforoj por konvinki la interparolanton. Ekz., li metafore diris, ke iu grimpis sur arbon por kapti fiŝon, per tio li argumentis, ke oni ne povas atingi sian celon per erara rimedo. Aliokaze li metaforis: “Oni intencas estingi fajron de ĉaro da lignaĵo nur per glaso da akvo.” Per tio li sugestis, ke oni ne povas fari ion per nesufiĉa forto. Tiuj de li elpensitaj metaforoj estas tre figurecaj kaj trafaj, kaj sekve fariĝis idiomoj ŝatataj de la popolo.

Multaj idiomoj estas faritaj surbaze de historiaj eventoj. Ekz., la idiomo “Por kulpigi aliulon, oni trovos pretekston” devenas el la evento okazinta en la periodo de “Printempo kaj Aŭtuno”. Iatempe, en Jin(Ĝin)-regno, post la morto de la reĝo, iu kortegano sinsekve mortigis du kronprincojn por surtronigi alian. Sed la nova reĝo diris, ke estas danĝere por li havi tian korteganon, kaj intencis mortigi lin. La kortegano konsideris tion maljusta kaj diris al la reĝo antaŭ sia morto: “Se vi volas kulpigi min, ne estas malfacile por vi trovi pretekston.” Tiuj signifoplenaj frazoj poste fariĝis idiomo ofte aplikata.

Kiel ekzemplojn de idiomoj origine el legendoj kaj anekdotoj mi citas du interesajn.

Estas antikva legendo: “Iu belulino nomata Xishi² (Ŝjiŝi) ofte sulkigis siajn brovojn pro brusta malsano, ŝia najbaro, ege malbela junulino nomata Dongshi³, trovante, ke sulkigi la brovojn estas bona rimedo por plibeligi, do imitis tion laŭ Xishi, sed la efiko estis, anstataŭ plibeligi, ke ŝi fariĝis eĉ pli malbela.” El tiu legendo kreiĝis la idiomo “Dongshi imitis la sulkigon de brovojn” por montri, ke blinda imitado rezultigas ridindaĵojn.

La idiomo “Vulpo profitas de la tigra potenco” originas el fabelo: Foje la tigo volis formanĝi la vulpon. La vulpo trompis la tigran: “La ĉiopova Dio faris min la reĝo de bestaro, se vi ne kredus, bonvolu sekvi min kaj rondiri tra la arbaro por propraokule vidi, ĉu la bestoj min timas.” La tigo sekvis ĝin kaj vidis, ke vere ĉiuj bestoj forkuris pro timo. La tigo, ne konsciinte, ke fakte estis ĝi mem, kiu fortimigis la bestojn, kredis la mensogon de la vulpo. Tiu idiomo estas tiel konata, ke aŭskultante ĝin, oni tuj komprenas, ke ĝi signifas riproĉon al tiu, kiu fiagas dank’ al alies potenco.

Ankaŭ el la versaĵoj de famaj poetoj kreiĝis

bonkvalitaj idiomoj. Ekz., el la plumo de Du Fu (712-770), la plej elstara poeto de Tang-dinastio (618-907), estis du poeziaj frazoj: “Interne de la ruĝaj pordoj⁴ putriĝas vino kaj viando pro abundeco, dume sur stratoj kuŝas mortintoj pro frostoj.” Poste, tiuj du multe recititaj frazoj fariĝis idiomo por speguli la akran kontraston inter diboĉo kaj mizero.

De la periodo de primitiva socio ĝis la nuna tempo, la ĉinoj travivis kelkmil jarojn en tiu vasta lando. En la daŭro de tiuj longaj jaroj, la viv-sperto akumulita de la ĉina popolo sendube estas ekstreme riĉa. Kaj el tiu diversflanka sperto kreskis multaj signifoplenaj idiomoj. Ekz., La idiomo “formikejo povas disfaligi la mil-*li*⁵-longan digon”, signifas, ke eĉ bagatelaĵo povas kaŭzi katastrofon. La alia idiomo “longa voj’ elprovas forton de ĉevalo; longa temp’— la koron de najbaro” estas evidente konkludo el profunda observado.

Pro tio, ke la ĉina kulturo estis vaste influita de budaismo, al la ĉina lingvo ne mankas budaismaj vortoj kaj eĉ idiomoj. La idiomo “kiu ligis la sonorilon, tiu povas ĝin malligi” originas el budaisma rakonto: “Iu budaista majstro foje demandis siajn adeptojn: ‘Kiu povas malligi la sonorilon sur la kolo de tigo?’ Neniu respondis. Venis alia majstro kaj respondis: ‘Tiu, kiu ĉirkaŭligis la sonorilon, povas ĝin malligi.’” Tiu idiomo aludas, ke kiu kaŭzis la ĝenon, tiu devas ĝin forigi. Antaŭ nelonge, s-ro Qian Qichen (Ĉjan Ĉjiĉen), la ĉina ministro por eksteraj aferoj, uzis tiun idiomon, kiam li parolis pri la nuna rilato inter Ĉinio kaj Usono. Per tio li konstatis, ke la streĉita rilato inter la du landoj estas estigita de Vaŝingtono kaj sekve devas esti malstreĉita de ĝi.

Por fini mian artikolon, mi ankoraŭfoje citas du idiomojn, unu el ili estas: “preni unu kaj forlasi dekmil”, tio signifas, ke mi nur prezentis dekkelkajn el tridekmiloj da idiomoj, do, mia prezentado ne estas plena. Sed laŭ alia idiomo “per rigardo tra la tubo oni povas vidi la makulon de leopardo kaj akiri la impreson pri la besto” mi esperas, ke mi donos al la legantoj la ĝeneralan aspekton de ĉinaj idiomoj malgraŭ la simpleco de mia artikolo. ■

1. “Printempo kaj Aŭtuno” estas la nomo de historia periodo de antikva Ĉinio. En tiu periodo ekzistis multaj regnoj, kiuj interbatalis por gajni hegemonion.

2. Xishi estis vere ekzistinta belulino en antikva Ĉinio.

3. Dongshi fakte ne ekzistis kaj nur estis pseŭdonima nomo.

4. Antikve, nur la aristokratoj rajtis posedi domojn kun ruĝaj pordoj, kaj oni uzis “ruĝan pordon” kiel simbolon de potenculoj.

5. *Li* estas ĉina mezur-unuo por distanco, unu *li*-o egalas al 500 metroj.



Parto de Beihai

ZHANG QINGZHEN:

Nova fizionomio de Beihai

LA malgranda urbo Beihai, ĉirkaŭita de maro en tri flankoj, situas ĉe Beibu-golfo, en la Suda Ĉina Maro. En la pasinteco la urbo havis sian prosperan periodon. Kiam la Silka Vojo en la nordokcidento de Ĉinio estis malvigla, Beihai, kiel unu el la starthavenoj de la Silka Vojo, estis internacia komerca haveno plej frua en Ĉinio.

La nuna Beihai havas favorajn kondiĉojn: ĝi rigardas al la Sudorienta Azio kun ekonomio la plej vigla en la mondo kaj dorse sin

apogas sur la sudokcidenta Ĉinio, kie abundas neferaĵoj kaj konserviĝas 80 miliardoj da tunoj da karbo. Tamen dum longa tempo la urbo estis tre malriĉa loko. Ĝia ĉefa okupo estis fiŝkaptado, kaj apenaŭ havis industrion. Antaŭe en la tuta Beihai-urbo ne estis kontentiga hotelo. En varma julio, se venis honora gasto, oni malaltigis temperaturon en gastoĉambro per glacio de frostigejo.

En 1984 Beihai fariĝis unu el la 14 malfermitaj urboj sur la marbordoj de Ĉinio. Post la pordomalfermo, estis Hongkong-a komercis-

to, kiu la unua venis ĉi tien por esplori pri la ebleco de investado. Li nomis la urbon "trezorejo ŝlosita en izolita loko" kaj ĝojis pro ĝia avangarda geografia kondiĉo kaj materia riĉfonto. Poste multaj komercistoj ĝoje venis esplori, sed foriris en bedaŭro. Ili opiniis, ke la urbo havas vastan perspektivon por evoluado, sed la bazaj instalaĵoj estas tro malbonaj por investado.

La Beihai-anoj komencis fundamentan konstruadon. De post 1984 ili kolektis 2.074 miliardojn da juanoj. Kuvajtio investis por haveno,

Usono por pilota instalaĵo de aerodromo, kaj konstruado de fervojo estas helpata de la internacia komerca pruntedono. Ĉar pruntepreno ne estis facila, sed iom riska, oni streĉe konstruis Beihai, tiel ke ili bone profitis de la investo. La konstruado de Arĝenta Plaĝo, inkluzive de digo kaj 21 konstruaĵoj, estis plenumita en malpli ol 200 tagoj.

La alia trajto en evoluo de Beihai estas konstruo de ekspluatejo. La Beihai-anoj la unuaj en Ĉinio fondis negocan merkaton de bieno. Tio akcelis la rekombinon de riĉfontoj. De Alilokaj laboruloj enfluis en Beihai kaj multiĝis kapitalo. Dank' al tio plirapidiĝis la konstruo de Beihai.

De 1992, entute 30 provincoj kaj municipoj, 65 ministerioj kaj ŝtataj komisionoj starigis 4 000 entreprenojn en Beihai; 22 landoj kaj regionoj investis 900 entreprenojn; eksterlandaj konsorcioj kaj Hongkong-aj industriaj kompanioj investis en 2 jaroj en Beihai dekojn da miliardoj da juanoj. La registaro de Beihai faris fundamentan konstruadon per la lupago de bieno. Sole en 1993 en Beihai tia pago atingis 3.1 miliardojn da juanoj. La loĝantaro de Beihai kreskis de 180 miloj al 490 miloj.

Traveturinte en la urbo Beihai, iu alilanda komercisto diris, ke malmultaj ĉinaj urboj, kiujn li vizitis, havas tiom larĝan vojon, kiel en Beihai. La de li menciita vojo estas Shugang-ŝoseo.

Ankaŭ mi aŭtoveturis sur la strato. Ĝi vere estas neordinara: Meze de ĝi estas 22-metra verda strio, rezervita por konteneraŭta viadukto. Ambaŭflanke de la verda strio estas 3-kanalaj vojoj, ekstere de ili estas po 4.5-metra verda strio, 2-kanala vojo, kaj denove verda strio, bicikla pasejo kaj trotuaro.

La lokanoj tre ĝojas pro la prospero de sia urbo. La urbo havas du nove konstruitajn dokojn por 10 000-tonela ŝipo por fari negocon kun 16 landoj kaj regionoj. La urbo havas ankaŭ modernan


aerodromon kaj ekspluatejon kun kompletaj instalaĵoj de mikroonda komunikado, aŭtomata telefonio, akvo- kaj elektro-provizado. La urbo estas konstruata kiel eksporta bazloko de mar-industrio, petrolkemia industrio, teksaĵoj, konstruaj materialoj kaj akvoproduktaĵoj.

Mi vizitis Qiaogang-urbeton de Beihai. Antaŭe tie estis sovaĝa tero. Fine de la 70-aj jaroj, por enloĝigi rifuĝintajn ĉinojn revenintajn de aliaj landoj, oni starigis tie domojn kaj fondis Qiaogang-urbeton. Post dekelk-jara konstruado, apud la malnovaj domoj leviĝis unu post alia komfortaj do-

moj de la rifuĝintoj, kiuj jam liberigis sin de malriĉeco.

Eksterordinare rapida disvolviĝo de ekonomio estigas neeviteblan negativan reagon. Tia fenomeno videblas ankaŭ en Beihai. Tiukaze sub la politiko de makrokontrolo de la ŝtato, la registaro de Beihai ĝustatempe translokis la gravitan punkton de ekonomia disvolvigo de domkonstruado kaj bieno-administrado al kompletigo de fundamentaj instalaĵoj, inkluzive de trafiko, fuelo kaj telekomunikado. Samtempe oni ordigis la dombienajn entreprenojn laŭ politiko de la ŝtato. ■

Sur la Arĝenta Plaĝo



Konstruaĵoj en la urbo



Tago de ĉinaj virinoj

de JIAN JUN

KIEL ĉinaj virinoj pasigas sian ordinaran tagon? Maje de 1995 la Ĉina Centra Televida Stacio faris enketon en la tuta lando pri la problemo de ĉinaj virinoj. La stacio dissendis al 10 900 familioj en diversaj lokoj 21 800 enketilojn, al ĉiu familio po du, unu por viro kaj la alia por virino. La stacio ricevis 19 797 validajn respondojn, el kiuj 10 061 estis faritaj de virinoj.

Dank' al la enketo oni konis ne nur la opinion de virinoj pri persona valoro, edzineco, familio kaj laboro, sed ankaŭ kion ili faras ĉiutage.

Oni povas dividi iliajn ĉiutagajn aktivadojn en 4 partojn: laborado, mastrumado, amuzado kaj dormado.

367.2 MINUTOJ POR LABORADO

Hodiaŭ, la ĉinaj virinoj laboras meznombro 367.2 minutojn ĉiutage kaj la viroj — 402.9. Por iri al la laborloko la virinoj uzas meznombro 33.6 minutojn ĉiutage kaj la viroj — 38.8.

La enketitaj urbaj virinoj laboras meznombro 352 minutojn ĉiutage kaj la kamparaj — 373. Sed por iri al la laboro la antaŭaj uzas meznombro 42.4 minutojn kaj la lastaj — 30.

Resume, inter la enketitoj 34.7% laboras 7-8 horojn ĉiutage; 10.9% — 6-7 horojn; 9.8% — 5-6 horojn; 7.2% — 8-9 horojn; 9% — 10 horojn kaj 24.1% — malpli ol 4 horojn.

192.3 MINUTOJ POR MASTRUMADO

Fari mastrumadon estas la ĉefa postlabora aktivado de ĉinaj virinoj. 50.8% de la demanditaj virinoj kaj 49% de la demanditaj viroj opiniis, ke fari mastrumadon estas la devo de virinoj, kies ĉefa enhavo estas prepari manĝaĵojn, lavi vestojn kaj fari aĉetadon. La enketitaj virinoj uzas meznombro 192.3 minutojn ĉiutage por tiu laboro kaj viroj — 111.5.

93.5 minutoj por prepari manĝaĵojn

Por prepari manĝaĵojn virinoj uzas meznombro 93.5 minutojn ĉiutage kaj viroj — 47.7. La enketitaj kamparaj virinoj uzas meznombro 95.2 minutojn ĉiutage



Patrino kaj filino

por tio kaj la urbaj — 89.3. Ju pli multe klerigitaj estas la urbaj virinoj, des pli malmulte ili uzas tempon por prepari manĝaĵojn. Generale 95% de la enketitoj uzas malpli ol 3 horojn ĉiutage por prepari manĝaĵojn.

52.4 minutoj por lavi vestojn

Ĉinaj virinoj uzas meznombro 52.4 minutojn ĉiutage por lavi vestojn kaj viroj — 27.5, kamparaj virinoj — 53, kaj la urbaj — 51.1. 95.9% de la enketitoj uzas malpli ol 2 horojn ĉiutage por tio.

46.3 minutoj por aĉetado

Ĉinaj virinoj uzas meznombro 46.3 minutojn ĉiutage por aĉetado kaj viroj — 36.3. Por tio la urbaj enketitoj uzas meznombro 57.8 minutojn ĉiutage, evidente pli multe ol la kamparaj.

Virinoj, en kies familio la pokapa enspezo estas 601 — 1 000 juanoj, uzas plej multe da tempo, t.e. meznombro 57.5 minutojn ĉiutage, por viziti magazenon aŭ foiron. Resume 96.9% de la enketitoj uzas malpli ol 2 horojn ĉiutage por aĉetado.

352.7 MINUTOJ POR AMUZADO

La enketo montris, ke ĉinaj virinoj legas meznombro 36.5 minutojn ĉiutage, inter ili la urbaj — 54.1 kaj la kamparaj — 28.8. Dank' al altiĝo de la klereco oni dediĉas pli kaj pli da tempo al legado. Virinoj kun malalta klereco legas meznombro 9.5 minutojn ĉiutage kaj tiuj, kiuj diplomitiĝis el altlernejoj — 84.1.

Ĉinaj virinoj televidas meznombro 156.8 minutojn ĉiutage, la urbaj — 163.7 kaj la kamparaj — 154.1. 36.4% de la enketitoj televidas 1-2 horojn ĉiutage.

Ĉinaj virinoj uzas meznombre 32.3 minutojn ĉiutage por aŭskulti radion, multe malpli ol por televido kaj legado. Urbaj virinoj aŭskultas radion meznombre 37.5 minutojn ĉiutage kaj la kamparaj — 30.2.

Krom legado, televido kaj aŭskultado de radio, la supre dirita amuzado inkluzivas ankaŭ kontakton kun amikoj, ekskurson, sportojn, viziton de kinejo ktp. Ĝenerale, ĉinaj virinoj uzas meznombre 352.7 minutojn ĉiutage por amuzado kaj viroj — 382.8.

445.6 MINUTOJ POR DORMADO

Dormado estas ne nur fundamenta fiziologia bezono de la homoj, sed ankaŭ fundamenta rimedo por ilia vivo, reguligo de spirito kaj disvolviĝo. La enketo montris, ke ĉinaj virinoj dormas meznombre 445.6 minutojn ĉiutage kaj viroj — 444.6. Urbaj virinoj dormas meznombre 448.3 minutojn ĉiutage kaj la kamparaj — 444.8. 26.5% de la enketitoj dormas 7-8 horojn ĉiutage.

VIRINAJ KONCEPTOJ

El la enketo oni konis multajn virinajn konceptojn reprezentantajn, valorajn kaj interesajn:

84.6% de la enketitoj aprobas la diron, ke pliboniĝo de la pozicio de virinoj estas intime interligita kun la socia evoluo.

74.1% de la enketitoj opinias, ke virinoj devas esti bonkoraj kaj teneraj, dum viroj — decidemaj kaj sen-

hezitaj.

92.5% de la enketitoj opinias, ke samkiel la viroj, ankaŭ la virinoj devas aktive partopreni sociajn aktivadojn en diversaj kampoj.

Koncerne sian estontan edzon, ĉinaj knabinoj donas atenton unue al liaj personaj kvalito, laborkapablo, karaktero kaj hobiaj, poste al liaj aĝo, fizionomio, staturado kaj enspezo kaj fine al liaj klereco, stataneco, familiaj kondiĉoj, nacieco k.a.

76.6% de la enketitoj opinias, ke la geedzoj ambaŭ devas respondecigi pri la familiaj aferoj kaj 69.9% de ili estas kontentaj pri la esprimmaniero de la sentoj inter la geedzoj; 97.4% opinias, ke la familio estas grava en la homa vivo, kaj 82.9% estas kontentaj pri la nuna familia vivo.

Pli ol 50% de la enketitoj mem havigas al si laboron. Ili preferas harmonie labori en konkurso kaj ŝatas laboron, kiu permesas al ili disvolvi sian talenton.

La enketo montris ankaŭ, ke ĉinaj virinoj tre ŝatas la kolorojn ruĝan, blankan kaj verdan.

Ĝenerale dirite, la hodiaŭaj ĉinaj virinoj estas aktivaj kaj progresemaj; ili deziras partopreni la sociajn aktivadojn kaj ĝui la egalecon kun viroj; ili heredis la tradiciajn virtojn de ĉinaj virinoj kaj samtempe multe progresigis siajn konceptojn pri familio kaj geedzeco. La menciitaj ŝanĝiĝoj en la konceptoj de virinoj iagrade montris la evoluon kaj ŝanĝiĝojn de ilia pozicio en la moderniga procedo de Ĉinio. ■


Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Ruĝdoma Songô

(Volumo I)

“Ruĝdoma Songô” estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj la dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de “Ruĝdoma Songô” estas en tri volumoj, inter kiuj la dua kaj tria



estos eldonitaj respektive en 1996 kaj 1997.

Formato: 14 x 22 cm. (bind.) 582 pĝ. kun 72 nigraj ilustraĵoj

Prezo: 26.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPC

Libroservo de UEA

Nia peranto en via lando



S-ino Gorild Heggelund en la 4-a Monda Virina Konferenco en Pekino

ESTIS aŭgusto de 1995, nelonge antaŭ la 4-a Monda Virina Konferenco en Pekino. Ni, tri virinoj el malsamaj landoj, amike interŝanĝis niajn spertojn. “Ni komencu de Ĉinio, ĉu bone? Parolu pri Ĉinio en viaj okuloj,” mi proponis.

“ĈINA KULTURO ESTAS PROFUNDA MARO”

“Nelonge post mia eklernado de la ĉina lingvo en Osla Universitato, mi unuafoje vizitis Ĉinion en la someraj ferioj de 1984,” diris s-ino He Xiuzhen (origine nomata Gorild Heggelund). Apude sidis ŝia superulino s-ino Sarah Burd Sharps, speciala konsilantino de la Monda Virina Fonduso de UN. Por la preparado de la Monda Virina Konferenco en 1995, ili venis en Pekinon vintre de 1993.

“Por kio vi lernas la ĉinan lingvon?” mi demandis He Xiuzhen, kiu deinfenece vivis en Norvegio.

“Dum miaj mezlernejaj jaroj mi multe legis pri Ĉinio. La libroj malfermis antaŭ mi novan mondon. Mi do pensis pri la ebleco lerni la ĉinan lingvon. Krome, mia instruisto kuraĝigis min studi interesajn. Mi estas tre kontenta pri mia decido. La ĉina kulturo estas profunda maro.”

Poste tiu ĉi altkreska norvegino edziniĝis al iu pekina junulo, kiu tiam funkciis kiel stiristo de aŭtobuso.

“Mi klare memoras mian unuafojan viziton en Ĉinio. Ni kvar norvegaj studentoj loĝis en hejmo de iu Chengdu-ano (Chengdu estas granda urbo en Sudokcidenta Ĉinio). La dommastroj lertas en kuir-

ZHANG KEJIA:

Amo al Ĉinio

ado kaj fervore regalis nin per bongustaj pladoj. Ili akompanis nin viziti parkojn kaj antikvajn restaĵojn de Ĉinio. Ili kune kun ni pasumis en matena bazaro... Mi sentis, ke ni estis iliaj filinoj.

“Ĉinio multe diferencas de mia lando. Poste mi refoje venis en Ĉinion por lernado. Mi ŝatas bicikli sur stratoj de Pekino, observante ordinaran vivon de ĉinoj. Tio tre interesas min.”

Nun s-ino He Xiuzhen havas feliĉan familion. Ŝi diris: “Ni havas kvinjaran filon. Li parolas kaj ĉine kaj norvege. Miaj bogepatroj estas ordinaraj pekianoj. Ili estas bonkoraj. Ni vivas harmonie. En la Printempa Festo la familianoj kune ĝuas bongustaĵojn, kaj *ĝjaŭzi*-ojn en la meznokto de tiu tago.” Parolante pri la ĉiutaga vivo, tiu ĉi orhara oficistino de UN aspektis kiel junā knabino ĝoja kaj scivolema.

KONTAKTO KUN ĈINAJ VIRINOJ

Dediĉe al la progressa afero de la tutmondaj virinoj kaj la homaro, la usonanino Sarah havas kun ĉinoj amikecon jam 13 jarojn.

En 1994, kun aliaj 4 oficistoj de Gren-agrikultura Organizo de UN kaj la Monda Infana Fonduso, s-ino Sarah vizitis Yunnan-ajn vilaĝojn, kie loĝas mjaŭoj kaj ji-oj. En tiuj izolitaj vilaĝoj oni geedziĝas al proksimaj parencoj kaj naskas malsanajn bebojn. Tie iam okazis tio, ke akuŝantino ne havis tranĉilon por rompi la umbilikan funiklon. Tie 80 procentoj da virinoj edziniĝis ne pro amo sed pro aĝokresko. La travivaĵo klare gravuriĝis en ŝia memoro “Mi neniam vidis tiel malriĉajn homojn. En tiu izolita loko la loĝantoj neniam vidis fremdlandanojn.”

“Mi vizitis kelkajn familiojn. Mi demandis la virinojn, kion ili plej timas en la ĉiutaga vivo. Ili senprokraste respondis, ke la unua estas vekto-porto de akvo, ĉar ĉiufoje ili devas grimpi longan deklivon; la dua estas maizomuelado, ĉar sen bruto ili devas mem movi la tretmuelilon; la tria estas malsano, ĉar al ili mankas kuracistoj kaj medikamentoj. Aŭdinte tion, oni surpriziĝis, ili neniel antaŭvidis, ke tiuj malkleraj virinoj tiel rapide kaj klare elbuŝiĝis tiom da malfacilaĵoj.


S-ino Sarah opiniis, ke por ekonomia disvolvigo oni devas koni la volon kaj penson de virinoj. Akirinte helpon ili devas plani ankaŭ por estonteco. Ili devas havi kuracistojn, puran akvon anstataŭ peti medikamentojn ekskluzive por solvi la urĝan problemon. S-ino Sarah instruis al la virinoj teknikon por ke tiuj konstruu lernejon kaj kuracejon per siaj propraj fortoj. Ŝi diris: “Ĉiuj tiuj virinoj lerte faras diversajn tolojn per lignaj teksiloj kaj belajn ornamaĵojn, sed ne havas la ideon liberigi sin el malriĉeco per siaj kapabloj. Ili bezonas helpon. Bedaŭrinde mi ne havis ŝancon reviziti ilin. Mi esperas, ke ili nun fartas bone.”

Dum la preparado kaj okazigo de la konferenco, s-inoj Sarah kaj He Xiuzhen estis okupitaj. Kiam ili kontaktiĝis kun ŝtatoficistoj, raportistoj kaj specialistoj, ili zorgis ankaŭ pri la montvilaĝaj virinoj.

ENTUZIASMO POR MEDIPROTEKTADO

S-ino He Xiuzhen, kiu tenas “neordinaran” rilaton kun Ĉinio, havis plenplenan tagordon en la duonjaro, kiam ŝi laboris por la konferenco en Pekino. Ŝi kaj s-ino Sarah senripoze parolis angle kaj ĉine kun ĉiuj koncernaj personoj — ili ĉeestis ĉiujn simulajn diskutojn kaj forumojn por la konferenco, okazigis diverstemajn akceptojn por raportistoj, trejnis ĉinajn oficistinojn, al kiuj mankis sperto okazigi tiel grandskalan internacian konferencon, par-

S-ino Gorild Heggelund (maldekstre) kaj s-ino Sarah Burd Sharps de Usono



toprenis la monkollektajn aktivadojn faritajn de alilandaj virinoj kaj edzinoj de alilandaj diplomatoj, raportis la laboron al UN, helpis la ĉinan Ŝtatan Komisionon de Planado en redakto de libro por sisteme analizi virojn kaj virinojn de Ĉinio, vizitis ĉinajn kamparojn, kontaktiĝis kun ĉininoj...

Fininte laboron de la konferenco, s-ino Sarah revenis al Usono. He Xiuzhen restis en Ĉinio, laborante pri medioprotektaj aferoj por Ekspluat-plana Oficejo de UN. Ĉar ŝi flue parolas la ĉinan lingvon, ŝia studfako por magistriĝo kaj doktoriĝo estas pri ĉina medio, ŝi estas tre ŝatata ĉi tie.

Ŝia nuna oficejo estas malgranda, sed komforta. Nia paroltemo estis “medio de Ĉinio”.

He Xiuzhen iam vizitis malriĉan Gansu-provincon en nordokcidenta Ĉinio, Sichuan-provincon kun plej multaj loĝantoj en sudokcidenta Ĉinio. Ŝi diris, ke en la trosekaj lokoj, antaŭ edziniĝo la virinoj tre zorgas pri puto en kaj proksime de la hejmo de sia fianĉo. En Sichuan-provinco ŝi vidis virinon laborantan sur kampo kun eta bebo surdorse. “Ankaŭ mi estas patrino. Pro tio mi tre kompatas tiun diligentan virinon. De mia travivaĵo mi komprenas, kiel kompleksa estas la loĝantara problemo de Ĉinio.”

Tiu norvegino diris: “Kiam ni veturis sur Yangzrivero de Chongqing al Yichang per ŝipo, ni trapasis la Tri Gorgojn. Tie la pejzaĝoj estas ĉarmaj. Mi vidis kamparanojn kulturantajn teron sur la ĉebordaj montoj. Mi vidis ankaŭ kadavron de porko kaj malpuraĵojn flosantajn sur la rivero. Tio profunde impresis min. Mi opinias, ke medioprotekto estas grava por evoluantaj landoj.

“Ĉinio havas kamparajn virinojn plej multnombrajn en la mondo. Multaj el ili estas malkleraj. Ili ne konas la teron kulturitan de ili mem, nek la rilaton inter la kultura metodo kaj la medio. Ili devas lerni legadon kaj teknikon. Ĉiujn tiujn problemojn menciis ĉinaj konferencanoj.”

AMO AL ĈINIO

Antaŭ nelonge mi refoje vizitis s-inon He, kiu estas pli okupata ol antaŭe. Ŝi partoprenis diversajn kunsidojn, diskutis kun ĉinaj ŝtatoficistoj, entreprenistoj kaj ordinaraj popolanoj, studis amason da materialoj kaj dokumentoj. Kiel oficistino pri medio de UN, ŝi ĉeestis premiodonan kunvenon de la Tutlanda Medioprotekta Verk-konkurso de Mez-kaj Element-lernejoj.

“Sukcesis tiuj aktivadoj. Zorgo pri media problemo influos la infanojn en ilia tuta vivo. Ili plenkreskos, faros decidojn. Tial estas por ili tre grave zorgi pri medio, epoko kaj homaro.” S-ino He estas optimisma pri la media perspektivo de Ĉinio kaj fidoplena pri ĝia medioprotektado.

Ĉe la adiaŭo ŝi donacis al mi fotojn, sur kiuj estas ŝi, ŝiaj edzo kaj filo. Sur la fotoj mi vidis ankaŭ s-inon Sarah kaj ŝian filinon. ■

Ekspluato de biologiaj riĉfontoj en Yunnan

MI faris duonmonatan vizitadon en profundaj montoj de Yunnan. Tie mi aŭdis multe pri ekspluato de biologiaj riĉfontoj kaj vidis multajn konstruojn koncerne la ekspluaton. En la okuloj de la tieaj loĝantoj plene utiligi kaj ekspluati biologiajn riĉfontojn estas granda afero, kiu strikte rilatas al bonhaviĝo.

ABUNDAJ BIOLOGIAJ RIĈFONTOJ

Yunnan estas provinco abunda je tabako. Kvankam ĝi situas landlime de sudokcidenta Ĉinio, tamen ĝia tabako estas tre fama tra la lando. Prilaboro de tabako estas ĉefa industrio en la ekonomio de Yunnan. Kaj Yunnan estas unu el la grandaj impostopagantaj provincoj en Ĉinio. Oni klare scias, ke ne estas optimisme, ke Yunnan kun pli ol 39 milionoj da loĝantoj dependas sole de tabako-produkto. Tial en la lastaj jaroj la yunnan-anoj plej multe diskutis, kiel trovi novan vojon taŭgan por la ekonomia disvolviĝo de la provinco. Finfine en 1995 la registaro de Yunnan-provinco faris decidon ekspluati riĉfontojn de mineraloj, biologiajn riĉfontojn kaj turismon kiel novajn industriojn, kiuj, same kiel tabaka industrio, multe akcelos la tiean ekonomian disvolviĝon.

Kial oni prezentis la problemon pri ekspluato de

biologiaj riĉfontoj? Botanikisto kaj estro de la Scienc-Teknika Komisiono de Yunnan-provinco s-ro Zhang Aoluo, kiu naskiĝis en orienta Ĉinio kaj laboris en Yunnan pli ol 40 jarojn, diris: "Diplomitiĝinte el universitato, mi eklaboris en Yunnan kaj vizitis multajn lokojn de ĝi. Kiel botanikisto, mi opinias, ke Yunnan ege abundas je biologiaj riĉfontoj." S-ro Zhang konigis, ke Yunnan estas ne nur "vegetala regno" kaj "animala regno", sed ankaŭ "mikroba regno". En Yunnan kreskas 18 000 specoj da altklasaj vegetaloj, t.e. pli ol duono de tiuj de Ĉinio. Yunnan ĝuas tropikan, subtropikan kaj frostan klimatojn. Tie ĉiu ajn vegetaĵo povas trovi medion taŭgan por sia kresko. Tie la koloroj de floroj estas aparte pimpaj. Legomoj tie maturiĝas, dum en aliaj lokoj estas morta sezono. En Yunnan troviĝas pli ol 270 specoj da rododendroj, malgrandaj kaj grandaj. Tie vivas multaj specoj de bestoj kaj nenombreblaj specoj de insektoj.

S-ro Zhang konigis al mi la ekspluatajn projektojn de biologiaj riĉfontoj de Yunnan. Fakte tio estas granda kategorio. Tamen s-ro Zhang laŭ sia kelkdek-jara ĉeloka enketo klasifikis la ekspluateblajn biologiajn riĉfontojn en 18 kategoriojn kaj 42 projektojn, inkluzive de la industrioj de manĝaĵoj el brutaj kaj agrikulturaj produktoj, bioproduktoj, medikamentoj, floroj, aromaĵoj, spiralaĵoj (spirin) kaj kafo. Fine s-ro Zhang diris, ke ĉiuj riĉfontoj povas elĉerpiĝi, escepte de la biologiaj, kiuj povas regeneriĝi. Por profitigi tiujn riĉfontojn al la homaro, oni devas fari ekspluaton en la vasta tereno. Kompreneble, la ekspluato devas esti modera por la ekologia ekvilibro.

NOVAJ INDUSTRIOJ

Esplorado pri biologiaj riĉfontoj iris jam multajn jarojn, sed ilia ekspluato komenciĝis nur antaŭ kelkaj jaroj. La bovaĵa bazo Xiaoshao, la tulipa bazo sur altebenaĵo Diqing kaj aliaj 5 bazoj estas konstruataj.

Yunnan indas je la nomo "mondo de floroj". Enirinte en la ĉambron de la hotelo, mi tuj vidis

Forcejo de orkideoj




belajn florojn: sur alte starantaj verdaj branĉoj estas floroj de orkideo, similaj al flugantaj blankaj papilioj, kiuj estas kulturitaj en Yunnan. Floroj jam fariĝis unu el la plej grandskalaj industrioj de biologiaj riĉfontoj en Yunnan. Kompanio Jingzheng (Ĝingĝeng), situanta en la antaŭurbo de Kunming, estas unu el la ĉefaj entreprenoj de floroj de Yunnan. Ĝia forcejo areo estas 43 000 kvadratajn metrojn kaj tie kreskas diversaj orkideoj. Enirinte la forcejon, mi vidis florantan dancantan orkideon. La stameno aspektas kiel knabo kun ĉapo sur la kapo, la petaloj kiel knabina jupo. Jiang Baofeng, direktoro de la kompanio, konigis, ke la kompanio kulturas 1 700 000 orkideojn kaj 1 300 000 tuberojn de orkideoj. Venontjare la kompanio produktos 3 000 000 altklasajn orkideojn.

Serio da produktoj el spiralaj algoj estas alia projekto en la ekspluato de la biologiaj riĉfontoj de Yunnan. Tiu spirala akvoplanto estas unu el la biospecioj plej antikvaj sur la terĝlobo. Ĝi havas historion de 3.5 miliardoj da jaroj. Ĝi enhavanta 65% da proteino ŝatas vivi en alkala lago. Sur la tero estas dek miloj da lagoj kaj nur en 3 el ili kreskas tia vegetaĵo. Chenghai-lago en Yunnan estas unu el ili. Malmulte da homoj vizitas la lagon ĉirkaŭitan de montoj. Ĉirkaŭveturinte la lagon, mi trovis grandan basenon de spiralaj algoj. Mi vidis, ke vicoj da elektraj norioj senĉese plugas en la baseno, tavolo da verdaĵoj flosas sur ĝi. Jen spiralaj algoj. Oni prilaboras la sekigitajn algojn en pulvoron, el kiu oni faras aldonajn de manĝaĵo kaj medikamenton. Reveninte al Kunming, mi vizitis Spirin-kompanion, entreprenon produktantan medikamentojn el spiralaj algoj. Tie mi sciigis, ke la spirala algo havas tre altan nutran valoron por homoj. El ĝi oni povas fari ne nur manĝaĵojn, sed ankaŭ tonikaĵojn kaj medikamentojn.

RIĈIGA VOJO

La decido ekspluati biologiajn riĉfontojn plej ĝojigas la kamparanojn de Yunnan. Ĉar en la ekspluato la registaro de Yunnan alprenas politikon intime rilatan al la kamparanoj, nome, kombinado de kompanio kun kamparanaj familioj. La kompanio devas havi grandan ekonomian forton kapablan transformi projekton en grandan industrion kaj longan industrian ĉenon. Ĝi prenas konstruon de materiala bazo kiel la unuan laborejon kaj liberigas la kamparanojn de disa laborado por fari kolektivajn produktadon, certasence turnas ilin en agrikulturajn laboristojn. Nun la profito ankoraŭ ne estas tre evidenta, tamen ĝi finfine vidigas al la kamparanoj esperon. Kun tempopaso la rezulto certe estos kontentiga.

Tion atestis la Manĝaja Kompanio Tiancheng, entrepreno investita de Ĉinio kaj alia lando kune, produktanta sanigan trinkaĵon el olivo. Ĝiaj ekipaĵoj estas unuaklasaj en la mondo. Por garantii la kvaliton de la produktoj, la kompanio konstruis bazon de



En la sukoelprema fabriko

materialoj kaj sukoelpreman fabrikon en la malriĉa montregiono Yongren-gubernio, kie abundas olivoj. De tiam la sovaĝaj fruktoj longe neglektitaj de la kamparanoj fariĝis trezoro. Kaj la gubernio brokis la monton por kulturi olivarbojn. En la rikolta sezono la kamparanoj kolektas kaj vendas la fruktojn al la kompanio anstataŭ haki la olivarbojn. Mi informiĝis de s-ro Zhang Yi, direktoro de la Manĝaja Kompanio Tiancheng, ke en 1994 la kompanio elspezis 100 000 juanojn por aĉeti la fruktojn kaj en 1995 la elspezo plimultiĝis. Tio sendube malfermis novan vojon por la kamparanoj sin liberigi de malriĉeco.

He Zhiqiang (He Ĝiĉjang), estro de la provinco, kaj Liu Jing (Liŭ Ĝing), ĝia vicestro, menciante la ekspluaton de biologiaj riĉfontoj de Yunnan, diris, ke en Yunnan vivas 7 milionoj da malriĉaj loĝantoj, la kombinado de kompanio kaj kamparanaj familioj ja estas nova vojo por ke la kamparanoj kiel eble plej rapide liberigu de malriĉeco. Se ekspluato de unu projekto povas akceli aron da industrioj kaj bonhavigi nombron da kamparanoj, do estas esperplene, ke Yunnan fariĝos granda ekonomia provinco. ■

EKONOMIO

- Antaŭ nelonge fondiĝis la Kompanio-grupo Shenhua, destinita por ekspluati karbobasenojn de Shenmu-Fugu kaj Dongsheng kaj ĝiajn kompletigitajn konstruojn, kiaj fervojo, elektrostacio kaj haveno.

La karbobasenoj Shenmu-Fugu kaj Dongsheng troviĝas en norda Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco kaj Yikezhao-ajmago de Interna Mongolio respektive. Oni jam konstatis, ke la karba rezervo de la du lokoj estas 233.6 miliardoj da tunoj entute, t.e. 1/4 de tiu konstatita de la lando. En 2010 plenumiĝos la projekto, kiu ampleksas karbominejon kun jara produktokvanto de 60 milionoj da tunoj da karbo, fervojon, havenon, oceanan ŝiparon kaj elektrostacion. Ĝia jara ekspluata povo estos pli ol cent milionoj da tunoj en la estonteco.


- Ekde 1996 la ĝenerala nivelo de la ĉina dogano reduktiĝis en granda skalo, nome, je almenaŭ 30%.

- Ĉinaj sciencistoj faris 10-jaran esploradon kaj sukcese elfaris laseran flughelpan sistemon por civila aviadilo. Ĝi ludas gravan rolon en sekura surterigo, normaligo de aerkursoj kaj redukto de reflugoj en malbonaj veteroj.

La lasera flughelpa sistemo estas instalita ambaŭflanke de la kurejo. En nokto kaj nebula tago helpe de la sistemo la piloto, distanca de la tero je 8-10 km, povas klare vidi ĝiajn oblikvajn laserajn radiojn.

- Produktejo de fosfora sterko, konsistanta el selekto de fosforaj ercoj kaj kemia inĝenierio, konstruiĝis kaj estis transdonita al produkto en la urbo Zhongxiang (Ĝongŝjang) de Hubei-provinco. Ĝi uzas malferman ekspluatan teknikon plej avangardan en la mondo. Ĝi, investita de la Monda Banko per 3.1 miliardoj da juanoj, ĉiujare povas produkti 1.5 milionojn da tunoj da fosfora sterko, per kiu oni povas pliprodukti ĉ. 1.5 miliardojn da kg. da greno. Ĝi havas gravan signifon por mildigi la fosforo-mankon por 60% de la agroj de Ĉinio.

En la produktejo de fosfora sterko



- La Ĉina Internacia Aviada Kompanio, unu el la gravaj entreprenoj de la ĉina civila aviado, ricevis la premion "Kvinstela Diamanto" de la Usona Scienca Asocio de Bonkvalitaj Servoj.

La asocio, kiel internacia organizo, konsistas el taksistoj kaj specialistoj de servaj establaĵoj de Usono kaj aliaj landoj. La asocio faris tiun decidon pro tio, ke la Ĉina Internacia Aviada Kompanio estas ĝenerale rekonita kiel unu el la plej bonaj aviadaj kompanioj en la mondo per siaj sekura flugado, moralo kaj ĝentila akcepto, kaj altkvalita flugado.



Yuan Xiaoying kaj ŝiaj aktinidioj

- Kamparano Yuan Xiaoying (Jŭan Ŝjaŭjing) de Xupu (Ŝjupu)-gubernio, Hunan-provinco, kulturis aktinidiojn sur 2/3 hektaro da kampo kun totala produktokvanto de 12 500 kg. La pomo-formaj aktinidioj, riĉaj je karno, suko kaj nutro, averaĝe pezas po 110 g kaj la plej granda 320 g.

MEDICINO

- Huo Xinghua devenis de medicinista familio kaj laboras kiel dermatologo en la Ginekologi-pediatria Hospitalo de Longhua-gubernio, Hebei-provinco. Ŝi aktive kolektis popolajn preskribojn unuopajn, efikajn kaj sekretajn por kuraci psoriazon kaj elfaris "Wanxuandan" el ĉinaj drogherboj por kuraci la malsanon.

En la lastaj jaroj ŝi sukcese kuracis 3 500 malsanulojn suferantajn de psorazio el 18 landoj kaj regionoj. Junie de 1994 en la Dua Tutlanda Simpozio pri Kuracado de Malfacilaj kaj Komplikaj Kazoj de Ĉinio "Wanxuandan" estis elektita de la fakuloj kiel tre efika medikamento. Ankaŭ pluraj ĵurnaloj kaj gazetoj de Usono, Germanio, Aŭstralio k.a. konigis per artikoloj doktorinon Huo Xinghua kaj la de ŝi inventitan medikamenton "Wanxuandan".

- Februare de 1995 Anzhen-hospitalo de Pekino sukcese faris al Ji Shuchun (Ĝji Ŝučun), kamparano el Henan-provinco, kiu suferis dualan idiopatian pulmofibriĝon, transplantadon de la maldekstra pulmo. Antaŭe Ĉinio ne povis fari tion. Nun la paciento kun bona farto jam revenis hejmen kaj povas fari malpezan laboron.

- Nova antikancera injektaĵo el taksusa alkoholo


estis ekzamenita de la Higiena Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko kaj komencis produktiĝi. Ĝia kvalito jam atingis la internacian normon. Antaŭe nur iu usona kompanio povas produkti tian medicinaĵon en la mondo.

La klinika praktiko en la Tumora Hospitalo sub la Ĉina Medicina Akademio, Pekina Hospitalo kaj aliaj 8 grandaj hospitaloj konfirmis, ke la injektaĵo havas evidentan efikon en kuraco de lastperiodaj ovaria, mamglanda, ezofaga kaj pulma kanceraj, la totala efikopocentaĵo estis 44.6%. Tio estis la unua fojo, ke Ĉinio sukcese elfaris medicinaĵon el sia propra materialo kaj ricevis ateston de nova medicinaĵo.

KULTURO

- Antaŭ nelonge okazis en Pekino ekspozicio de Nova Germana Arto el Nordrhein-Westfalen — la Generacio de la 9-a Jardeko.

La ekspoziciaĵoj ne nur prezentis la longhistorian kaj senĉese disvolvan artan tradicion de Nordrhein-Westfalen, sed ankaŭ kaj pli grave la artan kreadon de junaj kaj maljunaj artistoj de la loko. Tio estis la unua rondira ekspozicio de nuntempaj artaĵoj aranĝita de Germanio en Koreio, Ĉinio inkl. de Taiwan, Japanio kaj Hongkong.



En la ekspozicio de Nova Germana Arto el Nordrhein-Westfalen

SOCIO

- En 1991-1995 la nacia ekonomio de Ĉinio rapide kreskis, dum la loĝantaro malrapide kreskis. En la 5 jaroj la loĝantaro de Ĉinio malkreskis je 13 milionoj kompare kun tiu difinita en la plano. La atingo estis rikoltita en la pinthoroj de la nombro de la ĉinaj naskotaŭgaj virinoj. Iuj atentigis, ke oni ne supertaksu la atingon, ĉar ĝi estas nestabila.

NATURA PROTEKTADO

- En Yunnan-provinco de sudokcidenta Ĉinio na-

tura bambuaro kovras areon de 330 000 hektaroj. La bambuaro konsistas el pli ol 200 specioj de 27 genroj, t.e. 70% kaj 40% de tiuj de Ĉinio kaj la mondo respektive.


En Yunnan Kreskas iuj originalaj bambuoj malofte vidataj ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en aliaj landoj. Iuj havas altvaloran ŝoson kaj aromon, aliaj estas eksterordinare malmolaj kaj dikaj, triaj parazitaj sur arbo kaj el ili oni povas fari arbaleston, kvaraj ruĝe floras ktp.

KURIOZAĴOJ

- En zoo de Harbin en nordorienta Ĉinio naskiĝis jaguaro post cezara operacio. Ĝia patrino ne havis lakton kaj ĝi estis nutrita de hundino. Dank' al penado de la bredisto, naskiĝis intima sento inter la hundino kaj la jaguaro.

- Lastatempe en Fangxian(Fangŝjan)-gubernio, Hubei-provinco, oni trovis en natura lageto ruĝan vertebrulon kun birda kapo kaj fiŝa korpo. Ĝi longas 11 cm.

Tie estis faŭlto de la dua rompiĝo de la tero, kion pruvis Li Siguang, fama ĉina geologo. En la profundo de 4 000 m sub la tero seninterrompe ŝprucas termofonto, kio faris raran biologian medion de la mondo.



Fiŝo kun birda kapo

- Ĉe la orienta maŭzoleo de Qing-dinastio (1644-1911) en Zunhua, Hebei-provinco, kuŝas sepspana arkponto konstruita en 1661. Ĉe frapetado de la balustradoj aŭdiĝas forta harmonia sono en antikva ritmo.

TURISMO

- Vintre en Jilin(Ĝjilin)-provinco ĉie vidiĝis neĝaj pejzaĝoj de nordorienta Ĉinio. Nun la provinco rekonstruis la konkursajn skiejojn por akcepti skiantojn. Ĝi estas la unua provinco en Ĉinio, kiu servas al turistoj per skiado. En Jilin-provinco estas 5 skibazoj. Ili plejparte estas proksimaj al urbo, kun ski-vojoj kaj bonaj loĝ-kondiĉoj, i.a. la skiejo Beidahu taŭgas por okazigi internaciajn konkursojn.

La patro kaj birdoj

(Novelo)

de LI ZHIBANG

MIA patro estis gravulo. En mia memoro li ne havis la kapablon ridi kaj ĉiam tenis sin serioza. Mi kredis, ke ĉiuj gravuloj devis esti tiel seriozaj kiel la patro. La infanoj nature ŝatas ridi, sed la patro ne ŝatis tion. Li frue iris al la laboro kaj hejmenrevenis malfrue. Kaj multaj homoj vizitis lin en nia hejmo. Li ĉiam tenis seriozan mienon, kaj ju pli serioza li sin tenis, des pli altan respekton oni montris al li. Ŝajne la patro akceptis siajn subulojn pli varme ol nin, ĉar li prezentis al ili tason da varma teo.

Mia samklasano Gazi, najbare loĝanta, kuraĝas tikli sian patron, kaj mi tre enviis lin pri tio. Multfoje min impulsis la intenco tikli la patron. Kiam mi diris mian intencion al mia unua frato, li paliĝis de timo kaj tiris min flanken: "Ne risku, nia patro estas multkligema."

Mi havas 4 fratojn. La patro neniam zorgis pri nia lernado. Li zorgis nur pri sia laboro. Sed li neniam preteratentis la rezulton de nia ekzameno. Se ni brile trapasis ekzamenon, li faris kapjeson. Se ni malsukcesis, certe li batis nin je la okcipito, malgraŭ ke ni lernis ĉu en supera lernejo ĉu en elementa lernejo. Ofte la baton akompanis insulto: "Kiel fuŝan rezulton vi atingis? Fi al vi, malsaĝuloj!"

Miaj 4 fratoj kune loĝis en ĉambreto kun areo de 7 kvadrataj metroj, dum mi loĝis en la ĉambro de la gepatroj. Foje, noktomeze mi

aŭdis, ke la patrino petis la patron: "Vi devas iom prizorgi la infanojn." Sed la patro malpacienĝis: "Kion do vi prizorgos? Mi ne havas tempon por tio. Mi jam diris al vi, ke mi ne estas ordinara patro..." En la sekvanta tago mi diris al miaj fratoj la sintenon de la patro, sed la unua frato studanta en supera lernejo montris malkontenton: "Ĉu tia homo povas esti kalkulata kiel patro?"

Foje mi kaj mia kvara frato kaptis kelkajn birdojn kaj faris kaĝon el bambuaj vergetoj. Por kunligi la vergetojn, mi eĉ sangigis mian fingron. Sed mi kaj mia frato kore ĝojigis distriĝante per la birdoj.

Sed iun tagon la patro rimarkis la sekreton. Li iris en la balkonon, malfermis la kaĝon, elprenis la birdojn per la mano simila al agla ungo, kaj forte ĵetis ilin en la aeron. Li forflugigis ĉiujn birdojn. Mi ĉirkaŭprenis la gambon de la patro kaj ploregante petegis la patron. Sed li tute rifuzis mian peton, prenis la kaĝon, kiun mi kaj mia frato faris per nia tuta forto, kaj tretis ĝin. Mi kaj mia frato nenion kuraĝis diri, kvankam larmoj ruliĝadis en la okuloj. La patro kriegis al ni: "Nur nenifaruloj distriĝas per birdoj. Vi estas miaj filoj kaj devas diligente lerni ekskluzive!"

Pro tio mi malamis la patron.

Foje mi iris al la patro kun mia kajero de algebra ekzerco. "Ĉu mi ĝuste kalkulis?" Mi demandis la patron. Legante dokumenton, la patro strabe rigardis la kajeron kaj

diris: "Bone, ĝuste." Poste, kiam mi montris al li la kajeron kun 24 poentoj, li ekflamiĝis de kolero: "Stultulo, kiel vi preparis vin por la ekzameno?" "Sed mi jam montris al vi la ekzercon, kaj vi diris, ke mi faris ĝuste." Silentiĝis la patro. Kun bedaŭro li klinis sian kapon. Mi foriris en ĝojo, ke mi venĝis min.

La tempo flugis rapide kaj la patro emeritiĝis.

Mi kaj ĉiuj miaj fratoj jam edziĝis. En la hejmo estas nur la gepatroj. Diplomite el universitato, mi havis oficon en la buroo de la patro. Mi vidis la embarasiĝon de la patro post emeritiĝo. Li venis tre frue kiel kutime, sed aliulo jam okupis lian lokon. Li gapis tutan tagon en pordistejo, nenion diris, kaj nur sidadis. Post kelka tempo onklo pordisto Zhang diris al mi: "Dum longa tempo via patro ne venis."

En maltrankvilo mi iris al la patro. Li estis kuŝanta en kanapo kaj la rigardo estis fiksita sur la plafono. "Paĉjo," mi salutis kun timeto. La patro restis senmove en la kanapo, kaj murmure diris: "Ĉu la Kvina?" Mi rimarkis, ke kurbiĝis la dorso de la patro, maldensiĝis la brovoj kaj kapharoj, senbriliĝis la pupiloj: multe maljuniĝis la patro.

Foje mi kaj mia dujara filino Lilio vizitis la patron. Mi subite sentis, ke la patro montris apartan afablecon al Lilio. Li ĝoje promenadis ekstere kune kun la nepino. Li eĉ aĉetis por ŝi ruĝan baloneton kaj glaciaĵojn. Li neniam montris tian

afablecon al mi kaj miaj fratoj.

Post duonmonato la patrino vizitis nin kvin unu post alia. Ŝi diris kun larmoj: "Vizitu vian patron pli ofte. Li sopiras vin, kaj malsaniĝis de tio..."

En dimanĉo ni ĉiuj venis al la patro.

Sed la patro ne estis tiel varma kiel ni atendis. Li sidis en kanapo, ankoraŭ kun serioza mieno, rigardis nin jen tiun jen alian. Subite li elpoŝigis 50 juanojn kaj diris al la unua frato: "La Unua, iru aĉeti bongustaĵojn, kaj mi havas ĉemane botelon da vino." Ĉe la tablo la patro tostis por ni, kio konsternis nin. Kaj tiam ni vidis lian ridon.

Ĉu la patro povas ridi?!

Post kelkaj tagoj la patrino kaŝe diris al mi: "La Kvina, ĉu vi povus havigi al via patro ian okupon? Post dimanĉo via patro ofte silentis tutajn tagojn, kvazaŭ perdis la animon. Kion fari?"

Post medito mi demandis la patrino: "Kian okupon havigi al la patro? Li ĉiam sin okupis super sia ofico, kaj nenion alian prizorgis. Lia ofico estis multe pli grava ol la filoj..." Ĉe tiu momento mi rememoris la tragedion pri mia birdkaĝo.

Antaŭe la patro interesiĝis je sia oficeja tablo ekskluzive. Li ne kulturis florojn, ne bredis fiŝojn, ne scipovis ludi ŝakon nek danci...

"La Kvina, ĉu lasu lin bredi birdojn?" subite konsilis la patrino. "Birdoj de la najbara onklo Zhang multe interesis vian patron, kaj li ofte rigardis ties birdoflegadon longan tempon. Ŝajne li ekamis birdojn." Malrapide diris la patrino en peza tono.

"Ĉu vi memoras, kiel la patro tretis mian birdkaĝon?"

La patrino ŝetis al mi riproĉan rigardon: "Kial vi estas tiel malindulgema? Por kiu via patro pene laboradis? Ĉu sole por li mem? Se tiam li ne estus via patro, nun li ankoraŭ ne povas esti?"

Post kelke da tagoj mi prenis de amiko du birdkaĝojn kun kardeloj. La donaco multe ĝojigis la patron,

ke li ĉirkaŭradis la kaĝojn.

En dimanĉo ni kvin fratoj refoje vizitis la patron. La patro estis nutranta la birdojn per milio. La patrino diris kun ĝojo: "Via patro purigis la milion sub lupeo preskaŭ duontagon." La birdoj ekkantis, kaj ĝojo floris sur la vizaĝo de la patro. "Aŭskultu, ili kantas," ĝoje diris la patro. Kaj mi vidis libron pri birdobredado sur lia lito.

Tiutage la patro multe drinkis kaj ruĝiĝis la vizaĝo. Ĉe la fino li diris: "Mi kantu por vi popolkanton de mia hejmloko." Precize batante takton per manĝbastonetoj sur la tablo, li kantis tre interesan popolkanton pri amo de gejunuloj.

La patro ebriiĝis de sia kantado, kaj mi kaj la fratoj, escepte de la patrino, ĉiuj estis mirigitaj. De mia naskiĝo, mi neniam aŭdis kanton de la patro. La patrino forviŝis larmojn en la okuloj kaj diris korduŝite: "Kiel bonan memoron vi havas, ke vi ankoraŭ povas kanti tiun ĉi kanton."

Poste mi oficovojaĝis aliloken pli

ol duonmonaton. Post hejmenreveno mi vizitis mian patron. Mi vidis, ke li kuŝis en la lito. Li multe maldikiĝis kaj havis grizajn harojn ĉe la tempioj. La patrino rigardis min savanto: "La Kvina, via patro..."

"Kio okazis?"

"Birdo forflugis pro lia senatenato en nutrado, kaj de tio malvigligis via patro. Hodiaŭ li nenion manĝis..." tion dirante, la patrino prenis min per tremetanta mano.

"Do mi havigu al li plian."

"Tio ne helpas," kapneis la patrino. "Via dua frato havigis al li tre karan papagon, sed via patro neniel akceptis."

"Kial?"

"Via patro ja diris, ke li volas havi ekskluzive la forflugintan."

Tio embarasis min.

Mia edzino faris konsilon: "Ne malfacila estas la problemo. Vi havu alian kardelon kaj faru artifikon, por ke li kredu, ke revenis la forfluginta."



Do mi prenis de mia amiko plian kardelon, preskaŭ saman kiel la forfluginta. Mi kaŝis ĝin en mia maniko kaj venis al la patro. Mi ŝajnis min ĉirkaŭrigardanta en la balkono, kaj mia edzino implikis la patron en la ĉambro, mezuradis lian korpon pretekstante, ke ŝi trikos por li lanan veston. Je tiu momento mi elprenis la kardelon, ŝovis ĝin en la kaĝon kaj afekte hurais kriegante al la patro: "Paĉjo, vidu, revenas la kardelo. Mi jam fermis la kaĝon, vi venu rigardi!"

La patro stumble kuregis en la balkonon, longe rigardis la birdon, mankrakadis kaj ridis kiel infano. "Revenas mia birdo, ho, revenas mia birdo!"

La patro tute resaniĝis kaj rehavis la viglan humoron.

Denove estis dimanĉo. Ni kvin fratoj venis viziti la gepatrojn. La patrino aĉetis multe da vermiĉeloj kaj ĝoje diris al ni: "Mi ne atendis, ke vi memoras la datrevenon de la naskiĝo de via patro."

Ni rigardis unu aliajn sentante rimorson. Estas hontinde, ke filoj ne scias la naskiĝtagon de la patro. Sed oni ne devas kulpigi sole nin, ĉar en la pasinteco la patro neniam

solenis sian naskiĝtagon.

La patro trinketis buŝon da vino, malrapide klinis la kapon kaj murmuris al si mem kvazaŭ en sonĝo: "La birdo forflugis, mi multe ĉagreniĝis, kiam ĝi revenis, mi tiel ĝojiĝis, ke mi sendormis plurajn noktojn. Mi neniam ŝuldis al ĝi, mi tutkore flegis ĝin, kaj ĝi devas memori mian afablecon."

La patro trinkis tri tasojn da vino, silentis por kelka tempo kaj diris malrapide: "Sed post kelkaj tagoj mi rimarkis, ke ĉi tiu ne estas la forfluginta, tio estas simpatia artifiko de la Kvina por mi. Mi komprenis, ke la birdo neniam revenos. Mi sopiras ĝin, maltrankvilas, ke ĝi estos atakata de pluvo, ventego kaj malsato. Kaj ĝia dekstra piedo ankoraŭ havas vundon. Ĉe ĝia forflugo ĝia plumeto estis deĉirita, kaj mi kredas, ke ĝi postlasis tiun kiel memorigaĵon por mi..."

Ĉe tio ruĝiĝis la okuloj de la patro, ŝajne li estis ebrieta.

Ni ĉiuj silente aŭskultis kaj neniun el ni levis sian tason. Mi rimarkis, ke humidiĝis la okuloj de la unua frato. ■

(Trad. Wang Shirong)

GALERIO

Koloraj fajencaj amuzistoj



de RUAN HAIYING

La koloraj fajencaj amuzistoj estas trovitaj en tombo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.). La 21 muzikistoj kaj akrobatoj prezentas sur la fajenca plato en grandeco de 67X47.5 cm. La ludado infektas per vicleco kaj gajeco, kaj pere de tiu verko oni povas scii la amuzadon de tiu tempo.

En la centro de la scenejo estas anoncisto en robo kaj ĉapelo. Post li estas 2 dancantinoj, kaj apud ili 2 viroj kun pinta ĉapelo staras sur la manoj. Post ili 2 viroj prezentas "molan akrobataĵon". Ĉe la fono de la scenejo estas septeta grupo, absorbita en ludado de diversaj instrumentoj. Ambaŭflanke de la scenejo estas 7 spektantoj. Oni facile perceptas la graciecon de danco kaj akrobataĵo. Krome, ankaŭ la plastiko de la figuroj estas tre alloga.

Anonceto

En la 15-a de aŭgusto 1995 forpasis en Litomiŝlo verkisto Karolo Piĉ, kiu multe kontribuis al nia lingvo. Li postlasis grandan nombron da neeldonitaj verkoj literaturaj kaj prilingvaj, entute ĉ. 20 librojn. S-ro Reinhard Hanpenenthal, redaktoro de ILTIS-Forumo, volas eldoni la verkojn en serio pere de ILTIS-Eldonejo. Por solvi la financon problemon oni kolektas mendon de 3 verkoj de Piĉ: **La interna vivo de Esperanto, Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto, Ordeno de verkistoj**. Mendu ĉe: Postfach 600130, D-66067 Saarbrücken, Germanio.





ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第三期
(本刊代号:二—九—一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2